revuo

esperanto

novembro 1967
60-a jaro
n-ro 744 (11)

universala esperanto - asocio (en konsultaj rilatoj kun u.n.e.s.c.o.)

Kongreslando '68

ESPERANTO
revuo internacia

esperanto
novembro 1967

oficiala organo de universala esperanto-asocio

(en konsultaj rilatoj kun u.n.e.s.c.o.)

enhavo

149 Konsciigi la mondon pri la lingva problemo (Sadler)

150 Rerigardo al la Principaro de Frostavallen (Red.);
Ni diskonigu Esperanton per taŭga slogano (Lienhardt)

151 Ni kaj la radio-dissendoj (Nikolov);
Kial ne amatoraj elsendoj? (Bartosch)

152 Enkonduko en la librosciencon (3) (Haupenthal)

153 La programo "Pasporto" ekfunkciis

154 Belartaj Konkursoj 1967:
"Mia ĉio" (Pilger);
"Bela nimfin' " (Hooft/Pilger)

155 Organizo kaj rezultoj de kulturaj studrestadoj;
Biblioteko por infanoj kaj gejunuloj

156 CED;
Nekrologo Jakob

157 Pri "vodevilo" (letero);
Nekrologoj Stein, Moisley;
Soneto 2 (Shakespeare/Auld)

158 Lerneja Bulteno N-ro 11

160 Recenzoj

162 Ricevitaj eldonaĵoj

163 Esperanto servis en kriza horo (Mee)

164 Mallonge

165 53-a Universala Kongreso, Madrid, 1968;
Memoriga kalendaro;
Esperanto en radio;
Citaĵo

166 La Juna Vivo

167 Oficiala informilo n-ro 406:
Heredaĵo Rolf Peter Laufen;
La internaciaj konkursoj 1967

168 Anoncetoj

kovrila bildo

Suno kaj ombroj, arĥitekturaj trezoroj atendas vin en Hispanujo: La Gotika Arko en Barcelono (Foto: Pomaron).

bildojn liveris

161 Nozaki sadao

163 M. Chrétien & Fils

Fondita en 1904 de H. Hodler

Redaktoro: D-ro V. Sadler

Ĉion pri administrado de UEA kaj de la revuo Esperanto (abonado, reklamoj, manuskriptoj, anoncetoj) sendu al UNIVERSALA ESPERANTO-ASOCIO, Nieuwe Binnenweg 176, Rotterdam-2, Nederlando. Telef.: (010) 23 27 88 Ĝirkonto 378964.

TELEGRAMOJ: ESPERANTO ROTTERDAM.

Ĉiu materialo por difinita numero devas atingi la Centran Oficejon (vidu supre) **antaŭ** la 1-a de la antaŭa monato.

Manuskriptoj por "Esperanto" estu tajpitaj en 2 ekzempleroj sur unu flanko de la papero kun interlinia spaco kaj tre larĝa marĝeno.

Bankisto de U.E.A.:
Mees & Hope, Blaak 10, Rotterdam-1.

Presisto: Drukkerij Zwagers c.v., Rotterdam-6.

Traduko kaj represo de artikoloj, kun escepto de verkoj premiitaj en konkursoj, estas permesitaj, kondiĉe ke oni menciu la fonton.

Jara abono (1967): 18,75 gld. (kun membreco kaj jarlibro 25,— gld). Ĉefdelegitoj kaj Perantoj en multaj landoj. Unuopa numero: 1,— gld.

Tarifo por reklamoj: ricevebla laŭ peto.

Anoncetoj: 0,45 gld. aŭ 1 int. respondkupono por ĉiu duo da vortoj.
Tekstoj de anoncetoj kaj reklamoj aperas ekster la respondeco de la Redakcio.

Legantoj en ĉ. 80 landoj

Estraro de U.E.A.:
Prof. d-ro I. Lapenna, prezidanto kaj estrarano pri eksteraj kaj kulturaj rilatoj, 77 Grasmere Avenue, Wembley, Mddx, Britujo.

S-ro E. L. M. Wensing, vic-prezidanto kaj estrarano pri administrado, Postbus 412, Eindhoven, Ned.

S-ro E. Carlén, vic-prezidanto, Yxhult, Hällabrottet, Svedujo.

S-ro G. Becker, ĝenerala sekretario kaj estrarano pri informado, D-6653 Blieskastel, Schlossbergstr. 51, Germanujo.

S-ro M. Jaumotte, estrarano pri landaj kaj fakaj asocioj, 44 de Bruynlaan, Wilrijk-Antwerpen, Belgujo.

S-ro J. Toczyski, estrarano pri lernejoj, skr. p. 57, Gdańsk 1, Pollando.

S-ro E. J. Woessink, estrarano pri financoj, Vondellaan 47, Arnhem, Nederlando.

D-ro Peter Zlatnar, estrarano pri kongresoj, Rimska 7/II, Ljubljana, Jugoslavio.

Reprezentanto de TEJO ĉe la Estraro de UEA: S-ro Ulrich Lins, D-5 Köln-Dellbrück, Gemarkenstr. 146, Germanujo.

Centro de Esploro kaj Dokumentado
77, Grasmere Avenue, Wembley, Middlesex, Britujo, Telefono: (01) 904 9081.

Serva Centro: ĉe J. J. Sturzenegger, Rothstr. 7, 8057 Zürich, Svislando.

KONSCIIGI LA MONDON PRI LA LINGVA PROBLEMO

Plurlingva revuo lanĉota

Jam komenciĝis preparlaboroj por nova revuo, kiu havas precedencon nek en Esperanto, nek, verŝajne, en kiu ajn alia lingvo. Per artikoloj kaj informoj en pluraj naciaj lingvoj ĝi pritraktos, sub la titolo "La Monda Lingvo-Problemo", ĉiajn sociajn, jurajn, politikajn, ekonomiajn, psikologiajn kaj pure lingvistikajn aspektojn de la lingva problemo en la mondo.

La nova revuo aperados sub aŭspicio de CED (Centro de Esploro kaj Dokumentado pri la Monda Lingvo-Problemo) kaj estos la kulmino de ĝia kontribuo al la Jaro de Homaj Rajtoj 1968: la unua kajero aperos la 10-an de decembro 1968, okaze de la 20-a datreveno de la Universala Deklaracio de Homaj Rajtoj.*

Kiel jam anoncis prof. Lapenna, direktoro de CED, en la 52-a Universala Kongreso, la finan realigon de tiu ĉi longe kovata projekto ni dankas unuavice al trideko da personoj, kiuj komprenis la neceson de tia eldono kaj kiuj donacis per komunaj fortoj bazan kapitalon de ĉ. 20 000 guldenoj.

La lingva problemo estas hodiaŭ sendube pli akra kaj pli universala ol iam antaŭe en la historio. Malgraŭ tio, la politikistoj, sciencistoj kaj aliaj intelektuloj de la mondo plejparte agas, kvazaŭ ĝi ne ekzistus. Grandaj monsumoj subvencias lingvistikajn esplorojn pri forgesitaj dialektoj aŭ surskriboj sur tomboj, sed la bazajn rajtojn de lingvaj malplimultoj, la lingvan diskriminacion en internaciaj rilatoj, la vivantajn problemojn de vivantaj homoj oni preskaŭ tute ignoras. Iuj simple akceptas la lingvan problemon kiel ian naturan plagon neniam forigeblan, aliaj komforte rifuĝas en iun limigitan unulingvan medion kaj forgesas, ke en aliaj medioj, aliaj landoj oni suferas, koleras kaj eĉ mortigas unu la alian pro la lingvo.

Sur universitata nivelo

Tial necesas, ke CED mem iniciatu tiajn studojn, kiajn jam devus entrepreni la akademioj, universitatoj, esplorinstitutoj kaj aliaj sciencaj instancoj de la mondo. Tial necesas prezenti ĉiujn studojn sur la plej alta nivelo, por ke tiuj institucioj akceptu ilin kiel sian regulan labormaterialon. Tial necesas eldoni la tuton en diversaj lingvoj naciaj, ĉar legantoj, kiuj ne sufiĉe konscias la lingvan problemon, certe ne lernis la Internacian Lingvon. Tial, ankoraŭ,CED intertraktas kun internacie renoma nacilingva eldonejo, kiu espereble transprenos la distribuadon kaj prezentos la revuon al la sciencistoj de la mondo sub sia propra nomo. Tial, fine, aperos en la Redakta Komitato nomoj internacie konataj kaj respektataj: ĝis nun konsentis eniri la Komitaton prof. C. J. Adcock (Wellington), prof. Géza Bárczi (Budapest), prof. d-ro C. C. Berg (Leiden), prof. d-ro E. A. Bokarev (Moskvo), d-ro A. Capell (Sydney), prof. d-ro I. Lapenna (Londono), prof. Mario Pei (Nov-Jorko), prof. G. Waringhien (Parizo).

"La Monda Lingvo-Problemo" enhavos, en ĉiu kajero, po 5-6 sciencaj studoj. Krome aperos recenzoj de libroj pri rilataj temoj, koncizaj notoj kaj informoj, kaj bibliografio. Jen provizoraj titoloj de kelkaj studoj jam preparataj: "La lingva problemo en diplomatio" (Ralph Harry), "La jura situacio de oficialaj lingvoj en internaciaj organizaĵoj" (Ivo Lapenna), "Lingva imperiismo kaj kultura genocido en Hispanujo" (Juan Régulo-Pérez), "Sintenoj al la lingva problemo mezuritaj per publik-opiniaj enketoj" (Barney Emmart), "La lingva problemo en la Nederlandaj Antiloj" (Richard Wood). Kompreneble, ĉiu studo aperos en la nacia lingvo, kiun elektos la aŭtoro.

Ampleksaj resumoj en Esperanto

Krom la ĵus menciitaj temoj, la revuo povos pritrakti, ekzemple, la lingvan problemon en la scienco (konferencoj, patentoj, dokumentado, kostoj de interpretado), la problemon de instrulingvo en la lernejoj de plurnaciaj landoj (Hindujo, Afriko, Soveta Unio), lingvajn konfliktojn en dulingvaj landoj (Kanado, Belgujo), la leĝojn rilate lingvojn uzatajn en kortumoj, parlamentoj k.s., la lingvan problemon en komerco kaj industrio, ktp. ktp. Evidente, multaj el la temoj traktotaj, eĉ ĉiuj, estas intense interesaj ankaŭ por la sciantoj de Esperanto. Tial aperos, post ĉiu nacilingva originalo, ampleksa resumo en la Internacia Lingvo, longa de ¼ ĝis ⅓ de la originalo. Cetere, ankaŭ la titolo de la revuo estos en Esperanto.

La redaktoro de "La Monda Lingvo-Problemo" (sub la menciita Redakta Komitato) estas la subskribinto, kiu restas redaktoro de "Esperanto". Aperos tri kajeroj jare, po 64 paĝoj, en formato de ĉ. 23 x 17 cm., kun fortika, modernaspekta kovrilo. La abonkotizo estas fiksita je 25,— gld. jare, kaj oni povas aboni jam nun per la Centra Oficejo de UEA.

Detalaj reklamfolioj kaj specimenkajeroj eliros ĉirkaŭ junio de 1968, sufiĉe frue por varbi bonan kvanton da antaŭmendoj. La unua jarkolekto estos tiu de 1969, la aperdatoj januaro, majo kaj septembro. Escepte, la plej unua numero eliros jam unu monaton frue, en decembro 1968.

"La Monda Lingvo-Problemo", kun zorga preparo kaj celkomprena subteno, veku mondan atenton pri la ĉiam pli prema problemo de diverslingveco!

V. Sadler

---

* Ĉef-artikolo de prof. Lapenna pri la tuta agad-programo de UEA kaj CED okaze de la Jaro de Homaj Rajtoj aperos jam en la decembra "Esperanto" de la nuna jaro.

RERIGARDO AL LA PRINCIPARO DE FROSTAVALLEN

Antaŭ pli ol 11 jaroj, en julio de 1956, reprezentantoj de la Informaj Fakoj de la Landaj Esperanto-Asocioj kunvenis en Frostavallen, Svedujo, kaj starigis bazan principaron, kiu gvidu (kaj, iagrade, ankaŭ gvidis efektive) la laboron de informado pri la Internacia Lingvo. Ne temas pri absolutaj reguloj, ĉar la cirkonstancoj, ekzemple politikaj, en unu lando povas postuli tute alian specon de informado, ol en alia. Sed la principoj difinitaj en Frostavallen, kaj laste publikigitaj en la Jarlibro, Unua Parto, 1965, pj 38-42, estas tiuj, kiujn la kunvenintoj konsentis ĝenerale validaj.

Hodiaŭ ni komencas ĵeti novan rigardon al la Principaro, pro du kialoj. Unue, daŭre ankoraŭ montriĝas, ke eĉ la plej elementaj kaj ĉie aplikeblaj principoj (ekz. ne paroli pri Zamenhof kiel "Majstro", kio donas impreson de ia religia kulto kaj kion nete malaprobis Zamenhof mem) ne fiksiĝis ankoraŭ en ĉies kapo. Due, en la pasintaj 11 jaroj la monda konjunkturo neniel restis konstanta, kaj tre povas esti, ke nova diskuto kondukos al la bezono revizii iujn punktojn aŭ aldoni novajn.

La Fundamenta Principaro estas ampleksa dokumento, kiu enhavas ne nur principojn de la informa laboro, sed ankaŭ historiajn kaj t.n. tegmentajn artikolojn. Diskuti laŭorde ĉiujn 21 artikolojn kaj la multajn subpunktojn do ne estus tre konvene, des pli ke iuj punktoj jam firme establiĝis ankaŭ en la praktiko, dum aliaj punktoj diskuteblaj tute ne troviĝas en la nuna teksto. En la proksima estonteco aperos do en ĉi tiu revuo neregula serio da artikoloj tuŝantaj principojn, kiuj ŝajnas aparte aktualaj aŭ aparte meritas detaligon.

Jam en la ĉef-artikolo de tiu ĉi numero de "Esperanto" oni trovas prezenton de nova informa metodo ne menciita en la Principaro.

Ĉi-sube s-ro A. Lienhardt faras tute konkretan proponon pri alia inform-metodo: sloganoj (art. 11 (h) de la Principaro). Aparte atentinda estas lia rimarko pri la danĝero de miskompreneblaj sloganoj ("Lernu Esperanton!").

NI DISKONIGU ESPERANTON PER TAŬGA SLOGANO!

Granda plimulto da nuntempuloj ankoraŭ ne scias kio estas Esperanto, kaj neniam aŭdis aŭ legis ion pri internacia lingvo.

Por sciigi, en okulfrapa kaj efika maniero, al milionoj da individuoj ne-informitaj la ekziston kaj la disvastiĝon de Esperanto, la subskribinto proponas grandskalan kaj ĉiulandan uzon de nova slogano, konsistanta el nacilingva traduko de la mallonga demanda frazo:

"Ĉu vi parolas Esperanton?"

La nacilingvaj tradukoj "Parlez-vous Espéranto?" — "Do you speak Esperanto?" — "Sprechen Sie Esperanto?" — "Habla Usted Esperanto?" — "Spreekt u Esperanto?" — k.t.p. (frape similaj al la konataj demandoj "Parlez-vous français?" — "Do you speak English?" — "Sprechen Sie deutsch?" — k.t.p.) tuj komprenigas al iu ajn, ke Esperanto estas *lingvo* (kaj ne, kiel certaj legantoj de la slogano "Lernu Esperanton!" supozis, nova stenografio aŭ ludo aŭ danco aŭ io ajn alia).

Tutmonde uzebla

La proponita (nacilingva) slogano "Ĉu vi parolas Esperanton?" (ĉiam sekvata de la adreso de Landa Eo-Informejo aŭ de Eo-grupo) estas tutmonde uzebla sur afiŝoj, varbfolioj, gazet-artikoloj, inform-broŝuroj, lernolibroj, kaj simile.

Por doni, dekomence, maksimuman klarecon kaj efikecon al tiu nova slogano, estas rekomendinde kompletigi ĝin per taŭga (nacilingva) aldona argumento, ekzemple la jena:

La internacia lingvo Esperanto — multe pli facile lernebla ol iu ajn alia fremdlingvo — *ebligas al vi havi senperan kontakton kun homoj de ĉiuj landoj, kaj helpas al vi komprenigi vin tutmonde.*
Petu informojn ĉe: . . . .

Ĉar, laŭproverbe kaj efektive, praktiko valoras pli ol prediko, la subskribinto presigis afiŝeton (formato 10 x 27 cm) surhavantan la franclingvan tradukon de la nova slogano kaj aldona teksto, kaj petis dudekon da komercistoj glui ekzempleron sur bone videblan lokon. Krome, li fiksis ekzempleron sur la frontan kaj malfrontan vitron de sia aŭtomobilo. La rezultatoj superas la esperojn: neniam antaŭe li havis tiom multajn okazojn por doni respondon al la demando "Kio estas Esperanto?", por doni informojn pri ĝi kaj por enmanigi presaĵojn al interesiĝantoj.

Sekve al tiu kuraĝiga konstato, estas proponate al la gvidantoj de la Landaj Eo-Asocioj (kaj al la aktivaj esperantistoj en ĉiuj landoj) eksperimente uzi, kiel eble plej grandskale kaj diversmaniere, la novan sloganon "Ĉu vi parolas Esperanton?", kun celserve verkita aldonteksto kaj adreso de Eo-informejo. Senpaga ekzemplero de la ĵus menciita franclingva afiŝeto estas ricevebla kontraŭ afrankita koverto (franclandanoj) aŭ respondkupono (alilandanoj); bonvolu skribi al Esperanto-Societo, F-68-Mulhouse (24 av. de Riedisheim) kaj sendi, al la sama adreso, specimenon de viaj realigaĵoj laŭ la ĉi-supre klarigita principo.

A. Lienhardt

NI KAJ LA RADIODISSENDOJ

Esperanto estos vaste uzata tra la mondo, kiam multaj neesperantistaj organizaĵoj, oficejoj kaj institutoj komencos apliki ĝin. Nun ni iagrade sukcesis atingi tian pozicion ĉe la radio. Dudeko da radiostacioj regule dissendas programojn en la Internacia Lingvo. Tio okazas ne pro ia deziro de la estroj de tiuj stacioj helpi la disvastigon de esperanto, sed pro tio, ke ili estas konvinkitaj, ke per nia lingvo iliaj programoj estos aŭskultataj en multaj landoj.

Leteroj efikas

La prizorgantoj de la esperanto-radiodissendoj penas ekscii la efikon de la disaŭdigoj. Ili atente legas ĉiujn leterojn senditajn al ili de radioaŭskultantoj. Se la leteroj estas malmultaj, oni opinias ke ankaŭ la aŭskultantoj ne estas multnombraj. Tiam sekvas decido pri pli maloftaj dissendoj en tiu lingvo, eĉ ĉesigo de la dissendoj. Pasintjare la ĉefa kaŭzo por nuligo de la esperanto-dissendoj de Radio Bern estis ĝuste tiu kaŭzo. La sendo de amasaj protestaj leteroj igis la gvidantojn de la radiostacio renovigi la esperanto-radiodissendojn. Jen pro kio estas dezirinde ne nur regule aŭskultadi la esperanto-dissendojn, sed ankaŭ kelkfoje en la jaro sendi leterojn, per kiuj ni konfirmu la aŭskultadon.

Antaŭ tri jaroj mi aĉetis bonkvalitan radioaparaton produktitan en Germanujo. Per ĝi mi sukcesis kapti kaj aŭskultadi regule aŭ sporade la esperanto-dissendojn de dek radiostacioj. Al ĉiuj minimume dufoje en la jaro mi sendas leterojn. En ili mi skribas pri la aŭskulteblecoj en diversaj sezonoj, pri parazitaj bruoj, komentas la programerojn k.a. Tamen neniam mi forgesas, ke la ĉefoj de la radiostacioj ne estas esperantistoj kaj ne interesiĝas pri la disvastigo de esperanto. Pro tio mi nek turnas min al ili skribante "Kara Samideano", nek mi insistas, ke ili dissendu neŭtralajn programojn.

De tempo al tempo mi invitas geesperantistojn aŭskulti esperantodisaŭdigojn en mia domo. Post la aŭskultado ni sendas leteron al la radiostacio, subskribitan de ĉiuj aŭskultintoj.

Lastatempe mi komencis registri sur magnetofona bendo fragmentojn de bone aŭskulteblaj kaj interesaj esperanto-dissendoj. Ilin mi disaŭdigas en kunvenoj de la esperanto-societoj en urbo Sofia. Rezulto de tio estas la ekinteresiĝo de multaj ĉeestantoj aŭskulti la esperanto-radiodissendojn kaj sendado de kolektivaj leteroj al la radiostacioj, kiuj estas subskribitaj de multaj personoj.

Nun estas la ĝusta momento

Nun, kiam ni estas ĉe la sojlo de la Nova Jaro oni plej ofte reorganizas la dissendojn kaj la programojn de la radiostacioj. Per sendo de multe da leteroj al la radiostacioj, kiuj disaŭdigas en esperanto, ni helpu, ke nia lingvo havu pli bonajn poziciojn en la radio.

Nik. Nikolov

Por aktualaj informoj pri elsendoj en Esperanto vidu p. 165. Detala tabelo aperis en la oktobra "Esperanto", p. 145.

KIAL NE AMATORAJ ELSENDOJ?

En la epoko de satelitoj ankaŭ la apliko de Esperanto kaj informado pri la lingvo bezonas modernajn metodojn. Certe temas pri unuavice financa problemo, sed el diversaj eblecoj mi elektis la radioamatorismon. La utiligo de tiu serioza hobio por disvastigi la scion pri Esperanto kaj lernigi la lingvon ne postulas multe da mono.

Vastaj eblecoj

Ĉu vi jam pripensis la eblecojn de tiu moderna kaj disvolvebla hobio? Jen kelkaj:

1) Radioamatoro povas tuj atingi malproksimajn amikojn; nek maro, nek limo baras.

2) Oni sidas komforte en la hejmo kaj parolas aŭ disradias morso-signojn. La konversacio en Esperanto estas aŭdata de multaj aliaj radioamatoroj, kiuj per tio konatiĝas kun la Internacia Lingvo.

3) Informpetojn pri la lingvo oni povas tuj plenumi.

4) Kiam la reto de Esperantaj amatoraj stacioj funkcios kiel bona internacia organizo, la prestiĝo de Esperanto tiel kreskos, ke ĝia pozicio en la etero ne plu estos duba.

5) Ĉu vi scias, ke estas pli ol 3 milionoj da aktivaj radioamatoroj? Jen vasta kampo por la Internacia Lingvo.

Vi vidas, ke ni ne povas supertaksi la signifon de la kampanjo ESPERANTO EN LA ETERON, kiun gvidas la nove fondita Internacia Ligo de Esperantistaj Radio-Amatoroj (ILERA). Fariĝi radioamatoro estas afero prefere de junaj homoj, ĉar la preparo por la necesa ekzameno postulas emon kaj komprenon por elektronikaj problemoj. Estus tasko de TEJO diskuti la tutan demandon. Inter la neplu-junaj estas multaj, kiuj volonte (finance) apogus la starigon de Esperantaj amatoraj stacioj. Nepre kaj urĝe necesas kunordigo de la agado de jam ekzistantaj stacioj.

Detalajn informojn mi volonte donos.

OE 3 RU Rudolf Bartosch
Fak-delegito en A-3812 Gr. Siegharts, Aŭstrujo

Reinhard Haupenthal

ENKONDUKO EN LA LIBROSCIENCON DE ESPERANTO (3)

Inter la ekzamen-objektoj difinitaj de la Internacia Ekzamena Komisiono estas "Elementoj de Lingvistiko kaj Interlingvistiko (inkluzive historion de projektoj de komuna lingvo)". En sia tria artikolo de la serio s-ro Haupenthal gvidas nin ankaŭ tra tiu kampo.

41 Interlingvistiko

La tria parto de nia prelego turniĝas al kampo iom ekster la kutima interesiĝo de la esperantistoj kaj ofte eĉ de la esperantologoj: al la interlingvistiko. Por ne alfronti terminologiajn malfacilaĵojn ni tuj klarige aldonu, ke sub interlingvistiko ni komprenas nur la komparan planlingvistikon, t.e. tiu branĉo de la scienco, kiu okupiĝas pri konstruitaj lingvoj kaj projektoj. Ni do ne akceptas la ekstravagancaĵojn, kiujn oni reklamas en "Interlingvistika Informa Servo". (1)

Por seriozaj studoj sur tiu kampo ni posedas du bibliografiojn:

P. E. Stojan: Bibliografio de Internacia Lingvo, Genève 1929 (cit. BIL) kaj
Hugo Steiner: Katalogo pri la kolektoj de IEMW, Parto II, Wien 1958.

La dua libro iel povas esti rigardata kiel suplemento al BIL. Tamen ambaŭ havas konsiderindajn mankojn. Pri Volapük ekz. ili estas pli ol nekompletaj. (2)

Kvankam kelkaj el la pli frue menciitaj enkondukaj verkoj pri Esperanto donas supraĵajn notojn ankaŭ pri aliaj projektoj (ĉefe pri Volapük, Delegitaro kaj Ido), ni tie ĉi devas analizi la plej gravajn kompendiojn pri la temo.

Kvankam delonge elĉerpita, tamen ĝis hodiaŭ gardas sian validecon kaj konsultindecon unu monumenta verko pri la temo:

L. Couturat/L. Leau: Histoire de la langue universelle, Paris 1903 (²1907).

Tiu verko estis la rezulto de plurjara esplorado de Couturat. Oni dezirus, ke ĝi iam estu reeldonita. La mankojn kaj ellasojn de tiu verko forigas ĝia suplemento:

L. Couturat/L. Leau: Les nouvelles langues internationales, Paris 1907.

Por la esperantologo ĝi estas valora precipe tial, ke ĝi analizas la reformprojekton de Zamenhof el 1894 surbaze de la eldono de Javal.

(3) Same elstara kaj eĉ pli kompleta estas la epokfara libro de:

E. Drezen: Historio de la mondolingvo, Tri jarcentoj da serĉado, Leipzig 1931. (Ĵus — merite — represita.)

Ĝi unue aperis en la gazeto "La Nova Epoko" de OKT 28 — JUN 30. (Fakte ĝi estas traduko el la rusa.)

Broŝuroj po pluraj projektoj

Pli novadataj kaj limiĝantaj al po pluraj projektoj estas verkoj de:

H. Jacob: A planned auxiliary language, London 1947.

Ĝi okupiĝas pri Esperanto, Ido, Occidental, Novial, Interlingua (1903). Ankaŭ ĝi enhavas ĉapitrojn pri strukturaj problemoj de planlingvoj kaj pri hodiaŭaj (1947!) movadoj de planlingvoj. Valora, kvankam ne ĝenerale alirebla, ĉar verkita nederlande, estas la doktoriĝa laboro de:

W. J. A. Manders: Vijf kunsttaalen, Purmerend 1947, pri kiu oni tamen kun profito legos larĝan resumon, kiun faris G. Waringhien en "Lingvo kaj Vivo", p. 363-86.

Sekvu la mencio de kelkaj broŝuroj, kiuj donas supraĵan enkondukon en la temojn kaj povas sufiĉi por la normala esperantisto:

Julius Glück: La grandaj filozofoj kaj la universala lingvo, (= Muusses E-o Bibl. 1), Purmerend 1937.

En mallonga formo ĝi donas la opiniojn de Descartes, Comenius, Leibniz (4), Locke, Dalgarno, Wilkins, Nietzsche pri komuna lingvo.

Teo Jung: De Muheddin ĝis Mundilatin. Mondlingvaj projektoj tra la jarcentoj, (= Muusses E-o Bibl. 3), Purmerend 1937.

(5) Ĝi baziĝas sur Couturat kaj donas nur rudimentajn sciojn. Plej facile atingebla estas verketo de:

G. P. de Bruin: Historia skizo de la internacilingva ideo, Amsterdam s.j. (= ĉ. 1957).

Same facile ricevebla, sed en franca lingvo, estas:

Pierre Burney: Les langues internationales (= Que sais-je?, No. 968), Paris 1962.

De tiu malkara verketo ĵus aperis dua plibonigita eldono.

Por konatiĝi kun la taskoj de tiu lingva disciplino oni legu:

W. J. A. Manders: Interlingvistiko kaj esperantologio, Purmerend s.j. (=1950).

La taskojn precipe esperantologiajn analizas en tre leginda kaj ankoraŭ aktuala traktaĵo:

(daŭrigo dekstre)

---

(1) Difinojn liveras ankaŭ Manders kaj Wüster (Esperantologio 1 (1949/55)209-14.

(2) Kp. tiupunkte mian intervjuon en GER 19 (1966)63.

(3) Pri reformoj en Esperanto, Paris 1907. (kp. BIL 5630).

(4) Pri Leibniz kp. ankaŭ: Johannes Dietterle: Leibniz kiel antaŭbatalinto por nia ideo de mondhelplingvo — eraro!, en: La Vendreda Klubo, Leipzig 1921, p. 31-40.

(5) Spurojn de ia planlingvo oni trovas en la romano de Jung "Landoj de l' Fantazio".

LA PROGRAMO "PASPORTO" EKFUNKCIIS

Okaze de la Internacia Jaro de Turismo 1967 ĵus oficiale ekfunkciis Programo Pasporto, nova sistemo por internacia junulara vojaĝado. La celo estas interkontaktigi gejunulojn (15-30 j.), kiuj deziras ekkoni fremdan kulturon per restado dum iom longa tempo en alilanda familio, kun tiaj familioj, kiuj volonte gastigus senpage alilandan junul(in)on en sia hejmo. Memkompreneble, bona scio de Esperanto necesas ambaŭflanke.

TEJO oficialigis

Programon Pasporto elpensis juna argentinano, Rubén Feldman-González, kiu mem vizitis Usonon en 1966 per simila nacilingva organizaĵo. Li diskutis siajn spertojn kaj projekton kun d-roj Lapenna kaj Tonkin, s-roj Starr kaj Futran, ĉiuj dum restado en Nov-Jorko, kaj kun la sudamerikaj organizaĵoj Argentina Esperanto-Junularo kaj Guanabara Esperanto-Junularo. Fine la maturan skemon li prezentis al la Kongreso de ELNA en Washington kaj publikigis kiel 6-paĝan broŝuron. La stampon de oficialeco la Programo ricevis de TEJO, kiu akceptis ĝin en sian laborplanon.

La konkretan laboron de la Programo plenumos ĝia centra oficejo ĉe Bv. Oroño 866 "A", Rosario, Argentino. Ĝia funkcio estas simple kunordigi la programon kaj fari la unuajn kontaktojn inter la gastoj kaj gastigontoj. Sespersona komisiono en Rosario certigas glatan funkciadon. Gejunuloj, kiuj deziras esti gastoj alilande, devas skribi al Rosario, donante plenajn informojn pri si mem kaj pri siaj deziroj kaj aldonante du dolarojn por administraj kostoj. Siaflanke, la familioj, kiuj estas pretaj gastigi, same skribas al la centro en Rosario kun informoj pri la konsisto de la familio, periodo de gastigo (minimume unu monato), preferata aĝo kaj sekso de la gasto ktp. Se en la sama urbo troviĝas pli ol unu familio preta gastigi, ili povas aranĝi dividi inter si la gastigadon, ekz. po unu semajno. La gastigantoj ne havas aliajn respondecojn ol nura gastigo (manĝigo, loĝigo) dum la interkonsentita periodo.

Laŭ la publikigita plano, la centro en Rosario dum 1966 kaj 1967 nur registradis petojn kaj proponojn. Ĝi jam povis registri familiojn en Argentino, Brazilo, Ĉeĥoslovakujo, Hungarujo, Pollando, Usono k.a. landoj. Baldaŭ ekvojaĝos la unuaj gastoj.



Rubén Feldman (dekstre) diskutis la projekton kun Humphrey Tonkin en Usono.

Paul Neergaard: La esperantologio kaj ties disciplinoj, en:
Tra densa mallumo, Kopenhago 1942, p. 37-64.

Speciale valora en la eseo estas la bibliografia aldono, kiu listigas la plej gravajn eldonaĵojn ĝis 1942. — Estus dezirinde, ke la aŭtoro povu pretigi aktualigitan novan eldonon.

El la grandega amaso da literaturo pri plej diversaj unuopaj lingvoprojektoj ni mencios nenion por ne tro konfuzi niajn legantojn. La fakulo ja scios orientiĝi per la necesaj bibliografioj kaj periodaĵoj eldonataj en diversaj planlingvoj. Ni nur citos kelkajn historiajn verkojn, kiuj povas utili: Por studi la historion de Volapük oni daŭre devas uzi:

Robert Kniele: Das erste Jahrzehnt der Weltsprache Volapük, Überlingen 1889.

Por la pli posta tempo de Vp. ŝajne mankas detala priskribo. (Oni memoru, ke jam ĉ. 1889 Vp. atingis sian apogeon.) (6) La historion de la Délégation por l'Adoption d'une Langue Universelle oni hodiaŭ plej facile studas per la du volumoj de:

G. Waringhien: Leteroj de L. L. Zamenhof, Paris 1948,

kiu libro liveras ankaŭ la necesajn literaturajn indikojn. Valora estas ankaŭ la studo de:

B. Kotzin: Historio kaj teorio de Ido, Moskvo 1913.

En 1916 aperis germana traduko de la verko.

Tiu skizo povas jam sufiĉi. Ĝi montras, ke interlingvistiko (laŭ nia difino) ludas malgravan rolon kaj povas interesi nur kelkajn specialistojn. Hodiaŭ ni scias, ke la tuta lingvokrea aktiveco nur unu fojon estis favorita de la sorto: en la laboroj de Lazaro Zamenhof. Kaj lia "Lingvo Internacia" sola sukcesis transformiĝi el projekto en funkciantan lingvon.

---

(6) kp. ankaŭ la artikolon de Einstein en FK, kaj OV p. 258-75.

BELARTAJ KONKURSOJ 1967

Wouter Pilger:

mia ĉio

1.
kara,
vi jam vidis ĉiujn stelojn
antaŭ ol eĉ unu sputniko
enspaciĝis.
vi stelpinte
pikis mian noktan bruston.
la kosmo
estas kava.

2.
ĉi-nokte en sonĝo
mi postkuris vin
sur la ŝtonaj strandoj
de la sudo.
vi estis havinda
kiel juna delfeno.
sur la ŝtonaj strandoj
mi postkuris vin
dum vi kuŝis apude.
plej apude,
mia havinda.

3.
ne ĉiuj estas kia mi.
imagu!
la vojoj de liliputo
en brobdingnag
devas esti strangaj.
la birdo kiu ekstere
kantas la sunon
ne kantas por mi
laŭ sama tono.

4.
kara,
mi scius tre bone
kion fari
se mi ne havus vin,
mia ĉio.

(Originala Poezio: Unua Premio)

P. C. Hooft:

"Bela nimfin' "

(Kanteto)

Pieter Corneliszoon Hooft (1581-1647) historiisto kaj poeto

Bela nimfin', Mi amas vin;
Mi kion farus jame . . .
Laŭ mia vol' Ne ŝatus ol
Beligi vin orname,
Per brila or' Aŭ perl-trezor'
Por via kol' fiero;
Estus real', Se ne koral'
Pli estus laŭ prefero.

Vin vestus pli Per robo mi
De ĝojkoloroj helaj,
Estus agord' Kaj ĝu-komfort'
Al viaj flankoj belaj.
Kun la pied' Laŭ mia kred'
En blanka ŝu' vestata
Kaj via gamb' Por belornam'
En ŝtofa boto glata.

Wouter Pilger n. 1942 studento pri politikaj kaj sociaj sciencoj

La blanka man' Por akompan'
Beliĝus per koralo;
Blonda harar' Plektiĝus, ĉar
Jen nova idealo.
Kun ŝnura rav', Jen verd', jen flav',
Alternu delikate;
La hara ond' Kun bukla rond'
Pli plaĉos ja ol glate.

La peruket' Por la koket'
Jen alten, jen malplie;
Post ĉi-aranĝ' Kaj fina ŝanĝ'
Spegulos simpatie
L'okuloj min — Mi tiam vin
Rigardos kun pasio;
Esploros mi, Ĉu tiel ĉi
Ekestas harmonio.

Se vi do nun Vizaĝon kun
Okuloj ĝue brilaj
Plenaj de gaj', De ĝojo, kaj
Afablaj kaj ĝentilaj,
Turnus al mi; Se dolĉe vi
Aldone eĉ ridetus,
Mi tuj sen ĝen' L'animon en
La koron vian metus.

Kaj post rigard' Pri ĉia ard'
De via korp' ĉiela:
Via sinten', Via mien',
Kaj l' hararanĝo bela;
Je mia vort' Kun plena fort'
Mi vian korpon premus,
Kaj jen mi per Ĉi-manier'
Animon vian prenus.

La ruĝ' de l' buŝ' Per ama tuŝ'
Al via vang' transirus,
Per kis-pasi' Animon mi
El via buŝ' akirus.
Kaj nun, fein', Pri la fratin',
Kiu vin plaĉas ĉarme,
Agnosku vi: Neniam ŝi
Vin kisis tiel varme.

El la nederlanda: **Wouter Pilger**
(Traduka Poezio: Unua Premio)

POR LA JARFINA SEZONO

Serio de 6 bondezirokartoj "MONDFAMAJ PENTRAĴOJ" (Rembrandt, Da Vinci, Breughel, Renoir, Van Gogh, Utrillo), duoblaj kartoj, kun kovertoj.

Prezo: 3,75 gld.; 11 steloj

Serio de 6 diversaj Novjarkartoj "ORA JARCENTO HOLANDA" (Rembrandt k.a.), poŝtkartoj.

Prezo: 1,50 gld.; 6 steloj

Eldonis UEA

Mendu tuj ĉe la Centra Oficejo, Nieuwe Binnenweg 176, Rotterdam-2, Nederlando.

ORGANIZO KAJ REZULTOJ DE KULTURAJ STUDRESTADOJ

Ni verŝajne ne sufiĉe konscias, kiom ne-anstataŭebla montriĝas jam la Internacia Lingvo por akiri aktualan kaj tutmondan kulturon spite al la lingvaj baroj. La ĝenerala celo de la studrestadoj, pri kiuj temas ĉi tiu artikolo, estu la akirado de ĉiuj ĝeneralaj scioj pri la koncerna lando: historio, geografio, literaturo, arto, ekonomio, vidindaĵoj ktp. En la preparado de tiaj kulturaj studrestadoj, en kiuj Esperanto estas ne la *temo* sed la *praktika informorimedo*, la atento de la organizantoj estu konstante direktata al tiu demando: Kiel praktike konigi nian landon al alilandanoj?

Prelegoj, vizitoj, filmoj

Se oni konsentas, ke tiaj restadoj, por esti alireblaj por la plejmulto, devas daŭri ne pli ol tri semajnojn kaj okazi dum la someraj libertempoj, oni povas aranĝi ilin jene:— Matene: du prelegoj pri unu el la supre menciitaj temoj, kaj tuj poste diskuto kaj demandoj de la partoprenantoj. Posttagmeze, laŭeble: vizitoj al kelkaj vidindaj urboj, regionoj, uzinoj, muzeoj; prezentado de filmoj pri la tro malproksimaj lokoj, ktp.

El tiu tre rapida skizo oni povas tuj konstati kelkajn ŝatindajn avantaĝojn:

a) la kulturan pliriĉiĝon de la partoprenantoj, kiuj povas tiamaniere dum siaj ferioj viziti ĉiujare novan landon;

b) la praktikan pruvon de la valoro de Esperanto, kiu facile ebligas ion apenaŭ realigeblan per la naciaj lingvoj;

c) la favorigon de la publikaj instancoj, kiuj povas konstati la praktikajn rezultojn;

d) fine, la starigon de internaciaj amikecoj, precipe se oni aranĝas loĝadon ne en hoteloj, sed ĉe familioj. Kompreneble, en landoj kiel Francujo, kie ekzistas ideala Kulturdomo (Kastelo Grezijono) en turismoriĉa regiono, la problemo estas tre facile solvebla. En aliaj landoj, kie ne ekzistas tiaj domoj, studrestadoj estas antaŭvideblaj nur tie, kie troviĝas sufiĉa nombro da gastigantaj familioj.

En ĉiu lando, tamen, estas plej dezirinde, ke niaj Asocioj konsideru la organizadon de tiaj kulturaj studrestadoj. A.R.

BIBLIOTEKO POR INFANOJ KAJ GEJUNULOJ

En la universitata kvartalo de Munkeno, Germanujo, troviĝas unika "Internacia Junulara Biblioteko". Infanoj kaj gejunuloj povas tie elekti legaĵojn el pli ol 100 000 volumoj kolektitaj el 43 landoj. Por ili ekzistas speciala lego-ĉambro, speciala art-salono kaj ofte ŝanĝataj ekspozicioj.

La Biblioteko dankas sian fondiĝon, en 1949, al la organiza iniciato de s-ino Jella Zepman kaj al subvencio de la Fondaĵo Rockefeller. Nuntempe ĝi funkcias sub la direktado de s-ro Walter Scherf kaj ricevadas subvenciojn de la german-federacia, bavara kaj munkena instancoj.

80 % donacitaj

Tiaj subvencioj, tamen, permesas nur la ĝeneralan funkciadon kaj la aĉeton de specialaj verkoj, elĉerpitaj maloftaĵoj, foto-kopioj k.s. Por la daŭra kompletigado de siaj kolektoj la Biblioteko dependas de la bonvolo de eldonistoj tra la mondo, kiuj regule donacas al ĝi siajn novajn infan-literaturaĵojn. Tiel formiĝis ĉ. 80 % de la kolekto.

La ĝenerala infan-biblioteko estas organizita sur lingva bazo: por ĉiu el la plej abunde reprezentataj lingvoj (angla, franca, germana, itala, hispana, skandinaviaj kaj slavaj) laboras unu fakestro, kiu havas la taskon kontroli, administri kaj evoluigi la sekcion de la koncerna lingvo. Por la ali-lingvaj sekcioj zorgas eventualaj vizitantoj-fakuloj aŭ studentoj. Jam dek kvin el la sekcioj estas rigardataj kiel plene reprezentaj por la nuntempa infan-literaturo de la koncernaj lingvoj.

Krom libroj por infanoj la Biblioteko posedas ankaŭ grandan internacian kolekton de konsulta literaturo: studoj pri infan-literaturo, fakaj verkoj pri la organizo de infan-bibliotekoj, katalogoj ktp. Tial ĝi fariĝis ankaŭ centro por studoj, kaj la Biblioteko mem disponigas subvenciojn de 400 markoj monate por periodo de tri monatoj al elektitaj eksterlandaj studentoj.

Esperanto-sekcio?

Estus tre dezirinde, ke Biblioteko, kiu nomas sin internacia, posedu ankaŭ adekvatan kolekton da infanliteraturo en la Internacia Lingvo. Eldonejoj kaj privatuloj, kiuj deziras donaci infan-literaturon en Esperanto al la Biblioteko, povas adresi ĝin al:

Internationale Jugendbibliothek, D-8 München-23, Kaulbachstr. 11a, Germanujo.

(Informoj kompilitaj laŭ "Unesco Bulletin for Libraries")

CED

CENTRO DE ESPLORO KAJ DOKUMENTADO
77, Grasmere Avenue, WEMBLEY, Middlesex,
Anglujo. Telefono (01) 904 9081

DUA ELDONO DE CED/7 EN LA ANGLA

La konata raporto "Bazaj Faktoj pri la Internacia Lingvo Esperanto", publikigita unue en 1965 okaze de la Jaro de Internacia Kunlaboro, aperis ĝis nun en tradukoj angla, franca, hispana, japana, nederlanda kaj pola. En septembro aperis la dua eldono de la angla traduko kiel Doc. RDC/7. Ĝi estas presita, 12-paĝa, en la kutima formato de la CED-dokumentoj. Tiu ĉi eldono estas ĝisdatigita, kaj CED varme rekomendas ĝin por vasta utiligo en ĉiuj angle parolantaj landoj.

La blindul-biblioteko "Le Sage ten Broek" en Nijmegen, Nederlando, preparas brajlan eldonon de la nederlanda traduko de CED/7.

Estus tre utile, ke la dokumento CED/7, kiu enhavas ĉiujn bazajn faktojn pri la Internacia Lingvo, aperu en kiel eble plej multaj nacilingvaj tradukoj. Ĝi estas uzebla por plej diversaj okazoj, ekzemple kiel aldona dokumento por prezenti la nunan staton de Esperanto en la mondo; okaze de gazetaraj konferencoj; por kunmetado de prelegoj kaj artikoloj.

KUNLABORO KUN FIOCES

La Konsulta Komisiono pri Lernejoj, kiu respondecas pri la kontaktoj inter UEA kaj FIOCES (Internacia Federacio de Organizaĵoj por Lernejaj Korespondado kaj Interŝanĝoj), faris la necesajn paŝojn por realigi kompletan kunlaboron. Okaze de la kongreso de FIOCES en Madrid, UEA estis reprezentita de elstara lingvisto d-ro J. Liaño-Pacheco, kiu dediĉis tri tagojn al la konferenco kaj dank' al kies klopodoj la aliĝpeto estis akceptita unuanime kaj UEA fariĝis nova asocia membro de FIOCES.

La KKL de UEA sendis al ĉiuj lernejoj, en kiuj Esperanto estas instruata, cirkuleron kun informo pri la aliĝo de UEA al FIOCES kaj kun demandaro rilate la eblecojn utiligi la novan pozicion de UEA por progresigi la instruadon de Esperanto en la lernejoj. Pri la afero plue okupiĝas la KKL, al kiu ĉiuj lernejoj, en kiuj la lingvo estas instruata, bv. doni kiel eble plej efikan helpon.

INTERESA ENKETO PRI SCIO DE FREMDAJ LINGVOJ

La aŭgusta-septembra numero, 1967, de *The Unesco Courier* estas komplete dediĉita al la demando de paco kaj milito. Interalie, ĝi publikigis la unuajn rezultojn de internacia enketo, farita de la Eŭropa Kunordiga Centro por Socia Esploro kaj Dokumentado en Vieno kun la helpo de Unesko. La unua enketo okazis nur en tri landoj, nome en Francujo, Norvegujo kaj Pollando. Unu el la demandoj estis: "Ĉu vi parolas iun ajn fremdan lingvon?" Tiun demandon oni faris nur en Francujo kaj en Pollando, sed ne en Norvegujo. El la respondoj sekvas, ke en Francujo 26% parolas fremdan lingvon kaj 74% ne scias kiun ajn. En Pollando la jesaj respondoj estis 37% kaj la neaj 63%. Kompreneble, ankaŭ tiuj respondoj estas tre relativaj, ĉar ili dependas de la subjektiva opinio de ĉiu enketito pri sia propra scio de iu fremda lingvo. Kaj kutime okazas, ke la homoj tro fidas pri siaj tiurilataj scioj. Tamen, eĉ sen tiu rezervo, la situacio prezentiĝas pli ol malbone, se oni prenas en konsideron la milionojn da laborhoroj dediĉitaj al la lernado de fremdaj naciaj lingvoj en la lernejoj kaj ekster ili.

El aliaj interesaj respondoj menciindaj estas tiuj rilatantaj al la sidejo de UN. Nur 36% de la respondoj en Francujo, 73% en Norvegujo kaj 64% en Pollando estis ĝustaj: New York. En Francujo 34%, en Norvegujo 8% kaj en Pollando 15% erare respondis: Ĝenevo.

Estus interese kompari la sciojn pri mondaj aferoj inter personoj parolantaj la Internacian Lingvon kaj tiuj, kiuj ne posedas ĝin kvankam eble ili scias unu aŭ plurajn fremdajn naciajn lingvojn. Se la cirkonstancoj permesos, CED entreprenos tian enketon en 1968.

NEKROLOGO

HANS JAKOB (1891-1967)

En la unua semajno de oktobro mortis Hans Jakob, membro de UEA de post 1909, laste Dumviva Membro. Hans Jakob estis longe ligita al UEA en tiu aŭ alia funkcio: komence Delegito en Heidelberg, kie li naskiĝis; de 1912 oficisto de UEA en Ĝenevo; de 1920 ĝis 1924 ĝenerala sekretario; de 1924 ĝis 1934 Direktoro de la Centra Oficejo; 1947-1955 redaktoro de "Esperanto"; 1947-1961 komitatano, estrarano kaj administranto de la Serva Centro. Ekde 1913 li prizorgis la bibliotekon de Hector Hodler (poste de UEA). Li redaktis la Jarlibron de 1921 ĝis 1940. Artikolojn li verkis i.a. sub la pseŭdonomo Agricola.

Donacoj por CED

	£	ŝ	p
La stato je la 31-a de januaro 1967	25-	0-	0
S-ro E. F. Dean, Britujo	8-	0-	0
Gesinjoroj Laurie, Britujo	4-	0-	0
S-ro K. McLennan, Britujo	1-	9-	0
F-ino M. Meywes, Nederlando	1-	8-	0
S-ro E. Burg, Nederlando		5-	0
S-ro O. C. Lange, Danlando		10-	5
S-ro W. Giesler, Germanujo		3-	7
S-ro W. H. Mook, Nederlando		9-	0
S-ro J. Murray, Usono	1-	1-	7
S-ro J. Holleman, Nederlando		14-	0
S-ro E. Burg, Nederlando		5-	0
S-ro H. V. Rasmussen, Danlando		14-	2
F-ino E. Maasbommel, Nederlando	1-	0-	0
S-ino S. V. Sly, Britujo	2-	0-	0

(daŭrigo sur p. 157)

Gesinjoroj Holmes, Britujo	2- 0-0
S-ro O. C. Lange, Danlando	10-5
S-ro H. V. Rasmussen, Danlando	10-5
S-ro E. Burg, Nederlando	5-0
F-ino Vera Zlotnikova, Sov.	4- 0-0
S-ro E. F. Dean, Britujo	16- 0-0
Utrechta Esperantista Rondo	5- 0-0
S-ro E. Burg, Nederlando	5-0
S-ro N. Rytjkov, Britujo	5- 0-0
S-ro C. O. Lange, Danlando	10-0
S-ro H. V. Rasmussen, Danlando	10-4
S-ino P. Sinclair, Britujo	13-0
S-ro E. F. Dean, Britujo	8- 0-0
S-ro E. F. Dean, Britujo	8- 0-0
S-ro Ken Young, Britujo	10-0
S-ro H. V. Rasmussen, Danlando	10-5
S-ro E. Burg, Nederlando	5-0
S-ro H. Groendijk, Nederlando	1- 0-0
S-ro E. Burg, Nederlando	5-0
D-ro A. Albault, Francujo	11-0
S-ino Marjorie Duncan, Aŭstral.	5- 0-0
S-ro E. F. Dean, Britujo	8- 0-0
S-ro E. F. Dean, Britujo	8- 0-0
S-ro E. Burg, Nederlando	5-0
S-ro E. Burg, Nederlando	5-0
S-ro H. V. Rasmussen, Danlando	10-3
S-ro E. Burg, Nederlando	5-0
S-ro Armand Su, Ĉinujo	3-7
S-ro R. Moerbeek, Nederlando	10- 0-0
La stato je 18-a de septembro 1967	£ 133-14-2

Tutkoran dankon al ĉiuj donacintoj. Donacojn por CED akceptas C.O. de UEA, ĉiuj ĉefdelegitoj aŭ perantoj, aŭ la Oficejo de CED je la nomo de ĝia Direktoro.

PRI "VODEVILO"

(Posta noto al "La holanda pupo" de Baghy)

Mi loĝas en Vire, urbo situanta en provinco Normandio de Francujo, 60 kilometrojn sud-okcidente de Caen. En tiu urbo Vire, precize en (mallarĝa) valo (val, vau) apud Vire, vivis dum la 15-a jarcento poeto (laboristo pri drapo) nomita Basselin (Olivier), kiu verkis poeziaĵetojn facilajn, trinkinstigajn. Tiuj poeziaĵoj havis la nomon "Vaux de Vire" pro la loĝloko de la verkinto. Ili estis destinitaj por kantado. Ĉar ili poste multe disvastiĝis, la nomon Vire anstataŭis la multe pli konata vorto "ville" (urbo). Tio estas la origino de la vorto "vaudeville", en Esperanto "vodevilo". Poste tiuj poeziaĵoj estis enmetitaj en teatraĵojn. Nun vodevilo estas komedio facila kun ofte ŝanĝiĝanta intrigo.

En kelkaj vodeviloj (19-a jarcento) ankoraŭ troviĝas strofoj por kantado.

Basselin estis samtempulo de Jeanne d'Arc kaj partoprenis en la tiama "rezisto-movado" kontraŭ angloj. La usona poeto Longfellow verkis belan poeziaĵon pri Basselin (ĝi troviĝas en "Birds of Passage"). La teatro-kinejo en Vire havas la nomon "Le Basselin".

A. Legret

Vire, Francujo, 23 sep 67

NEKROLOGOJ

FRANZ STEIN

Mortis dum libertempo en Italujo s-ro Franz Stein, siatempe ĉefurbestro de Mainz, Germanujo. Kiel urbestro li estis ankaŭ prezidanto de LKK por la 43-a UK en 1958 kaj, en tiu periodo, prezidis la Komitaton de Eŭropaj Urbestroj kaj Magistratoj por Esploro pri Esperanto, formitan de 37 urboj en 11 landoj, al kies enketo 586 el 669 urbestroj respondis favore al Esperanto.



Franz Stein, el balkono de la urbodomo de Mainz, salutis la partoprenantojn de la 43-a Universala Kongreso en 1958.

MARY CHARLOTTE MOISLEY

La 98-jara dumviva membro de UEA s-ino Mary C. Moisley mortis en Powell River, B.C., Kanado, la 14-an de septembro 1967. Ŝi eklernis la lingvon en sia 92-a vivjaro kaj tre baldaŭ flue parolis ĝin.

William Shakespeare:

SONETO 2

Kiam sieĝos kvardek vintroj frunte
kaj fosos sulkojn sur belkampo via,
la junlivreo, kiu logas bunte,
estos ĉifaĵ' kaduka kaj paria;

se oni miros, kien fuĝis rava
belotrezor' de via juno sana,
diri: post via okulparo kava,
estus hontaĵ' konsuma, indo vana.

Laŭdindus multe pli la belouzo
se povus vi respondi: jena bebo
sumigos mian konton, per l'ekskuzo
pruvos la belon via laŭ heredo.

Tiam rejunus via olda vango,
kaj varmus, kvankam frida, via sango.

el la angla: **W. Auld**



red.: s-ro J. Toczyski

UNUAVICE LERNEJOJ DEVAS ESTI INFORMATAJ PRI LA LINGVO INTERNACIA

Kial la lernejoj?

Ĉiuj aktivuloj en la Esperanto-movado konsentas pri tio, ke niaj ĉefaj taskoj estas la ĝusta informado pri la lingvo, pri ĝiaj utilo kaj uzebleco, kaj kompreneble ankaŭ bona kaj kompetenta instruado de ĝi. La plej celtrafa vojo en informa laboro estas certe, paralele kun informado al aŭtoritatuloj, informado al lernejaj infanoj, ĉar por ili la vorto de instruisto estas plenaŭtoritata, kredinda kaj netuŝebla, kaj pere de ili oni facile povas atingi pli larĝajn rondojn, nome ĉiujn familianojn de la lernantoj. Ili ja ripetos ĉiujn viajn argumentojn, eĉ multfoje, reveninte de la lernejo. Tamen, antaŭ ol oni povos informi la lernantojn, oni devas konkeri la pedagogian stabon en la lernejo, por ne sperti flanke de ili malaprobon, aŭ eĉ kontraŭbatalon. Tio estas akirebla nur pere de interna laboro inter la instruistaro, kaj certe tiun laboron povas fari nur instruisto laboranta en la koncerna lernejo. La rezisto de instruantoj de fremdaj lingvoj, aŭ eĉ de la instruistoj, kiuj nur konas fremdajn lingvojn, estas ĉiam tre granda. Sed la vera fonto de indiferenteco kaj kontraŭstaroj estas tutsimple manko de scio pri la Lingvo Internacia, ĝia taŭgeco en internaciaj rilatoj kaj ĝia perfekteco. Malhelpas ofte ankaŭ la tradicio, la rutino en instruado de fremdaj lingvoj kaj la ekzistantaj programoj de instruado en la lernejo. Tial oni nepre devas deinterne informi la instruistaron pri la lingvo, konsiderante la gravajn principojn de ne-altrudado, ne-fanatikado kaj.... ne-troigado de la afero.

Kiamaniere informi kaj kiam?

Por ne altrudi la aferon al gekolegoj, por ne paroli konstante nur pri Esperanto, oni devas elekti konvenan momenton, ekzemple okaze de iu konferenco, laborkunsido aŭ tute simpla societa kunveno, dum kiu oni povas por kelka tempo turni la atenton de la ĉeestantoj al la problemo de internacia lingvo kaj ĝia instruado. Kompreneble tiam oni devas esti armita per diversaj dokumentoj, kiuj povus pruvi la ĝustecon de la prezentataj opinioj, la verecon de la eligitaj argumentoj.

Kiam en la lernejo jam ekzistas Esperanta Rondeto, oni povas de tempo al tempo utiligi la okazojn de lernejaj solenaĵoj por prezenti la lingvon mem kaj la problemojn de interlingvo, ĝia bezono kaj utileco, substrekante ĉiujn malfacilaĵojn naskiĝantajn de multlingveco.

En multaj lernejoj aŭ oni aranĝas murgazetojn de tempo al tempo, aŭ oni eldonas almenaŭ unufoje en la jaro gazeton por la gelernantoj kaj gepatroj. En tiuj "gazetoj" ne devas manki ankaŭ informoj pri la Esperanto-rondo aŭ Esperanto-kurso kaj pri la kontaktoj, kiujn la lernejo havas kun alilandaj lernejoj.

Se la instruisto de Esperanto partoprenis Universalan Kongreson aŭ ian alian Esperanto-aranĝon dum la ferioj, nepre li devas aranĝi renkontiĝon kun la lernejanoj, invitante ankaŭ gekolegojn, por rakonti al ili la impresojn, la spertojn kaj travivaĵojn, kiujn donis al li la estado en internacia esperantlingva medio. Tiaj prezentoj ĉiam donas la deziratan konvinkon por dubantoj. Oni devas ankaŭ utiligi ĉiun viziton de fremdlanda esperantisto en la urbo por alkonduki lin je la lerneja kunveno.

En lernejoj, en kiuj Esperanto estas instruata, la gvidanto de la lecionoj devas nepre interesiĝi pri la aliaj lernobjektoj en la lernejo kaj, eĉ sen peto de kolego, liveri al li pere de eksterlandaj Esperanto-kontaktoj materialojn utilajn al li.

Devoj de la Esperanto-instruisto

Sed kiam oni parolas A, oni devas ankaŭ diri B. Ne sufiĉas informi pri Esperanto sur sia tereno kaj ĝui en la koro la kontentecon de plenumita bona laboro por Esperanto. Oni devas ankaŭ intime kunlabori kun Esperantaj organizaĵoj, unuavice kun la loka societo, kun ILEI kaj kun UEA, kies individua membro devas esti nepre ĉiu Esperanto-instruisto, apogante ĝin per akurata kaj preciza statistiko, kiu estas la plej grava armilo en la manoj de la gvidantoj de la Esperanto-movado.

INSTRUPROBLEMOJ DUM LA KONGRESO EN ROTTERDAM

Kiel ni jam menciis en la septembra numero de "Esperanto", pri la instruado de Esperanto okupiĝis la 2-a Labora Sekcio de la 52-a UK kaj la kunveno de ILEI. Kompreneble pritraktis la temon ankaŭ la Komitato de UEA, kiu eĉ elektis specialan komisionon por pritaksi la raporton de la Estraro pri la lernejoj, konsistantan el specialistoj en tiuj aferoj (Söderberg, Radvánszky, Régulo-Pérez kaj Olsson).

La Dua Labora Sekcio de la Kongreso okazis dimanĉe la sesan de aŭgusto kaj kiel temon havis "Lerneja kaj eksterlerneja instruado de la Internacia Lingvo". Partoprenis 80 personoj el 21 landoj, kaj en la diskuto petis la parolon 17 personoj. La raporton faris sekretario de KKL sinjoro G. Becker, kiu, apogante sin je la

alsenditaj raportoj de instruistoj kaj aliaj informoj, prezentis la situacion sur la internacia lerneja kampo. La konkludo estis jenaj:

1) Oni devas nepre plimultigi la instruistojn konantajn la Internacian Lingvon;
2) Nepre la nivelo de la lingvo-kono ĉe la instruistoj de Esperanto devas esti plialtigita, pere de konstantaj kelksemajnaj kursoj, kelktagaj seminarioj, konferencoj ktp.;
3) Oni devas konstante informi la lernejajn aŭtoritatojn pri la atingoj sur la kampo de Esperanto-instruado en aliaj landoj kaj liveri al la instruistaj profesiaj organizaĵoj bone redaktitan inform-materialon pri tiuj atingoj por publikigo en iliaj revuoj;
4) Oni devas pripensi la plej celtrafan sistemon en la kompilado de statistikoj pri la instruado de Esperanto;
5) Oni devas uzi grandskale la eblecojn, kiujn donas la konataj agadoj; Grajnoj en Vento, Oraj Spikoj, Geonkloj Esperantistaj, La Kastora Klubo, ktp.;
6) En ĉiu lando oni devas organizi Instruistan Sekcion kaj ĉiujare landan konferencon de instruistoj dum la lernejaj ferioj;
7) Kie ekzistas la eblecoj, la lernejoj aliĝu al la Asociiĝintaj Lernejoj de Unesko, kaj nepre ĉiu lernejo, en kiu Esperanto estas instruata, aliĝu al la Interlerneja Interkonsento;
8) KKL organizu en 1968 antaŭ la UK en Madrid la Trian Konferencon de Lernejoj, en kiuj Esperanto estas instruata.

Internacia Ligo de Esperantistaj Instruistoj okazigis la okan de aŭgusto sub la prezido de d-ro Mario Dazzini kunvenon, kiun partoprenis 41 personoj. Dum la kunveno estis prezentita aŭd-vida metodo de instruado de Esperanto de sinjoroj Antonije kaj Tibor Sekelj. Estis ankaŭ vigla diskuto.

MALLONGAJ INFORMOJ

La Kastora Klubo de Esperanto (Adreso: Ĉefa Kastoro, 3 Berwick Avenue, **Urmston**, Manchester, Britujo) estas bonega ludo por la internacia infana lernantaro de Esperanto. Aneco estas senpaga, sed ĉiu aliĝinto devas lerni parkere kaj ripeti al sia instruisto jenan promeson: "Mi promesas diligente lerni Esperanton, mi promesas ĉiam porti la verdan stelon kaj mi promesas ĉiam konsideri alian homon kiel fraton, de kiu ajn raso, koloro aŭ kredo li estu". De tempo al tempo aperas la Kastora Letero, kiu kunligas la membrojn de la Klubo. Proponu al viaj infanoj ankaŭ aliĝi al la Klubo kaj helpu al la organizanto per laŭebla financa apogo.

Dum la 2-a Internacia Lerneja Ekspozicio en Dortmund (Germanujo), kiun partoprenis 300 ekspoziciantoj el tuta Eŭropo, konata komitatano de UEA, sinjoro Ludwig Pickel, aranĝis Esperanto-standon, kiun vizitis 1300 personoj. Ĉiuj laŭdezire ricevadis informojn pri Esperanto kaj kunprenis inform-materialon.

En Francujo en la lerneja jaro 1966/67 Esperanto estis instruata en 5 seminarioj, 21 liceoj, 12 kolegioj, 9 elementaj lernejoj kaj 2 specialaj lernejoj por 565 gelernantoj, kaj krom tio ekzistis 35 publikaj kursoj kun 347 gelernantoj. La ciferoj ne estas kompletaj.

Dum la ferioj (julio 1967) en Gdańsk (Pollando) estis organizita trisemajna metodika kurso por Esperanto-instruistoj, dum kiu prelegis plej elstaraj esperantistoj el Pollando kaj kelkaj ne-esperantistaj pedagogoj. La kurson partoprenis 35 personoj, el kiuj 21 faris la ekzamenon pri kapableco de Esperanto-instruado antaŭ komisiono sub prezido de la loka Ŝtata Lerneja Inspektorino, fakulo en la lingvo-instruado, kaj ricevis la diplomon de la Distrikta Metodika Kuratoreja Centro. La kurson gvidis kol. prof. Aleksander Grela el Nowy Sącz. La organizanto estis la Instruista Sekcio de Pola Esperanto-Asocio.

Ĉe la Junulara Kultur-Domo en Gdańsk (Adreso: Gdańsk-Wrzeszcz, Str. Hanki Sawickiej 23/28) oni organizis Esperantistan Skoltan Trupon, kiu serĉas kontaktojn kun skoltoj-esperantistoj en la mondo.

Grajnoj en Vento (adreso: Rue des Pins 66, CH-2500 Bienne/Biel 7, Svislando) en sia 102-a cirkulero (jul-aŭg. 1967) sciigas, ke ekde 1 nov 1967 la kunlaborantoj sendu siajn kontribuaĵojn je nur 20 ekzempleroj anstataŭ 25. Ekde tiu tempo ankaŭ, iu ajn klaso povos sen aliĝo al GeV kaj sen antaŭa anonco laŭdezire kunlabori kun GeV. Pro la nova sistemo de kunlaboro po unu ekzemplero de la internacia lerneja kajero ricevos nur tiuj klasoj, kiuj partoprenis en ĝia realigo.

KONSULTA KOMISIONO PRI LERNEJOJ de UEA (asocia membro de FIOCES)

Ĝeneralaĵoj kaj rilatoj kun profesiaj instruistaj organizaĵoj: S-ro Józef Toczyski, estrarano de UEA pri lernejoj, skr. p. 57, Gdańsk, Pollando.

Reprezentanto de ILEI: F-ino Jeanne Dedieu, 26 Ave. de l' U.R.S.S., Toulouse, Francujo.

Pedagogiaj demandoj: S-ro R. H. M. Markarian, 2, Hazel Grove, Hartwood Park, Chorley, Lancs., Britujo; tel. 4572.

Organizaj demandoj: S-ro G. Becker, D-6653 Blieskastel, Schlossbergstr. 51, Germanujo.

Eksteraj kunlaborantoj:

Rilatoj kun internaciaj instancoj: Prof. I. Lapenna, 77 Grasmere Avenue, Wembley, Mddx, Britujo.

Konferencoj: D-ro Peter Zlatnar, Rimska c 7/II, Ljubljana, Jug; tel. 2 03 60.

Altgrada instruado: Prof. J. Régulo Pérez, Apartado 25, La Laguna, Tenerife, Kanarioj.

Mezgrada instruado: D-ro M. Dazzini, Via Palestro 36, Massa (M.C.), Italujo.

Elementa instruado: S-ino R. Thorsen, Dyblandsvangen 7, Brønshøj, Danlando.

Bonvolu ĉiam turni vin al la kompetenta membro laŭ la supraj indikoj.

KLASIKA HISTORIO INTERLINGVISTIKA

Historio de la mondolingvo, de E. Drezen. Tria eld. (foto-represo), Pirato, Oosaka, 1967. 240 p. 26 x 17 cm., bind., ilus. 12,— gld.*

Reeldono de scienca verko, kiu unue aperis en 1931, estas pruvo de ĝia valoro. Temas pri detala pritrakto pri la historio de la mondlingvaj projektoj ekde la mezepoko ĝis 1927. Kiom vasta estas ĉi tiu laboro, pri tio povas atesti ĉiu, kiu iam interesiĝis pri tiuj problemoj.

En la tria eldono de la libro de Drezen mankas la fama antaŭparolo de N. I. Marr, fondinto de la jafetida lingvoteorio, kiu siatempe estis konsiderata la sola ebla dialektik-materialisma lingvistika sistemo.

La historiaj eraroj en la verko estas sufiĉe malmultnombraj, kaj cetere oni jam korektis ilin dum la trideko da jaroj inter la unua kaj la tria eldonoj.

En pĝ. 26, ekz-e, la aŭtoro citas la faman antaŭdiron de la profeto Cefanja, ke iam la homaro denove ricevos "lingvon puran". Fakte temas pri "lipoj", ne pri "lingvo" (laŭ G. Waringhien, ESEOJ, 1956). Same, (pĝ. 27) Mohyeddin kreis sian projekton Balaibalan ne por doni al la mondo universalan lingvon, sed por havi "sekretan lingvon" inter la sufiaj mistikuloj (laŭ grafo de Gobineau, Introduction à l' essai sur l' inégalité des races humaines, 1855). Sampaĝe oni citas la verkojn de Teofilo Folengo en la projekto "latino macaronico". Ankaŭ ĉi tie ne temas pri mondlingvo, sed pri mokmiksaĵo el la latina kaj la norditalaj dialektoj, kun la celo amuzi la legantojn (laŭ W. J. A. Manders, Latino macaronico, Esperantologio II).

Tiel ankaŭ pri J. J. Becher (pĝ. 37) aperas kelkaj neĝustaĵoj. Li fakte intencis uzi sian projekton kiel pontlingvon por mekanika tradukado de unu lingvo al la alia. Lia projekto estas do antaŭulo de Algol, ne de Esperanto (laŭ J. J. Becher, Zur mechanischen Sprachübersetzung, ein Programmierungsversuch aus dem Jahre 1661, Wirtschaftshochschule Mannheim, eld. Kohlhammer, Stuttgart, 1962).

Ankaŭ nekorekta estas la priskribo de la Ido-afero. La vera aŭtoro de Ido estis ja Couturat, ne de Beaufront, kiun la unua uzis nur kiel pajlohomon (laŭ artikolo de Richard Berger en Cosmoglotta).

Hodiaŭ ne plu aktualaj estas la rimarkoj de Drezen pri la klasa signifo de Interlingua (de Peano). La pli posta historio de Interlingua kaj de la Interlingua-idoj (ekz-e de Interlingua-IALA) demonstras, laŭ mia opinio, ke la juĝo de Drezen estis tro supraĵa.

Lingve la verko estas sufiĉe bona. Sed oftaj estas la preseraroj (la tria eldono estas fakte fotostatika represo de la dua) kaj pluraj (supozeble) slavedevenaj nekutimaj frazkonstruoj.

Malgraŭ ĉi tiuj malmultaj rimarkoj, la reeldono de tiu verko, sur bonkvalita papero, elegante bindita, plenumis bezonon vere sentatan en la interlingvistikaj medioj.

Tazio Carlevaro (Svislando)

Ne grimacu! Naŭ originalaj rakontoj humuraj de Ueyama masao. Eld. L'omnibuso, Kioto, 1967. 84 p., 17,5 x 11 cm. Ofsetita. 2,— gld.*

Humuraj, jes; leĝeraj kaj ĝenerale facilanimaj; sed agrabla kaj malpena legaĵo. La mondo de Ueyama en ĉi tiu volumeto estas la mondo de lombardejoj, publikaj banejoj kaj ne tute bonmoraj dancejoj, la mondo de ordinarulo ne tro alte dotita je intelekto, kiu implikiĝas en la etaj kaptiloj de la ĉiutago. (Ĉu necesas diri, ke tio estas masko de intelekto akra kaj humuro vigla? — sed masko konvinke portata.) Lia sinteno al la geedzeco estas universala: "... ilin atendis nek edzino... nek ŝuldo... nek tajpilo... Unuvorte, neniu kaŭzo por sopiri sian hejmon. Ili estis feliĉaj." Sed kio distingas lin estas lia sinteno al la vira voluptemo, kaj tio (bedaŭrinde?) ne estas tiel universala; li scias pikkrevigi la pretendeman amoron, kaj tio ŝajnas kojno de lia humuro. Tro malofte oni sukcesas ekridi, en la nuna epoko, pri la vira seksvanteco. Tiun donacon Ueyama alportas: ŝatu ĝin! En tiu ĉi libro eĉ la glosaro ridigas.

W. Auld (Skotlando)

Gram Muzilo/Mi ludas Muzilon, de P. H. Paruzel. Eld. Muzilo, Dordrecht, Nederlando (1967). 110 p. 29 x 21 cm., 5057 ekz. Dulingva eld. pola-Esperanta.*

Tiu libro havas molan kovrilon — io maltaŭga por konsult- aŭ lerno-libro. Aliflanke, ĝi estas klare presita, kun sufiĉe grandaj literoj, kaj — la plej bona eco — la klarigoj simple prezentataj. La ekzercaro kaj transskriboj por piano estas bone gradigitaj laŭ malfacileco. La aŭtoro dediĉis 20 paĝojn al kantoj ktp. kun Esperantaj vortoj.

Ĉar la aŭtoro ŝajne akceptis kiel fakto, ke la leganto jam studis muzikon, venis al mi la demando: kiu estus pli preta lerni Muzilon, ĉu estanta aŭ estonta muzikisto? Mi kredas, ke la nunaj muzikistoj jam konsideras la tradician notskribon kiel "Esperanto en la muzika mondo" (Vidu p. 4), malgraŭ ĝia malfacileco ktp.

Reno Caruana (Malto)

Ĉiujn eldonaĵojn signitajn per steleto oni mendu ĉe UEA, la aliajn ĉe la koncerna eldonejo.

KONDIĈOJ DE RECENZOJ

La revuo "Esperanto" principe recenzas ĉiujn duope ricevitajn novajn librojn, broŝurojn kaj diskojn. Unuope ricevitajn, kiel ankaŭ politikajn aŭ religiajn eldonaĵojn, ĝi nur mencias. Nepetitaj recenzoj ne aperas.

RENKONTO KUN JAPANECO KAJ HOMECO

Pri arto kaj morto, orig. novelaro de Miyamoto masao. Eld. Esperanto-Kenkjuŝa, Gamagori, 1967. 170 p., 18 x 13 cm., bd. Il.* 7,50 gld.

La ok originalaj rakontoj de ĉi tiu volumo — el kiuj kelkaj jam aperis sur la paĝoj de *Heroldo* kaj *Monda Kulturo* — prezentas epizodojn el la vivo, kaj plej ofte el la morto, de kelkaj famaj japanaj beletristoj kaj artistoj, de Yamanoue no Okura, kompilinto de la poemaro Manjoo (8-a jarcento), ĝis la pasiplena poetino Yosano akiko, mortinta en 1942.

Ni eniras la arthistorion

Per tiuj rakontoj ni eniras senpere la arthistorion de Japanujo kaj tiel lernas multon el ĝi. Aliflanke, kvankam ĉiu klera esperantisto havas nun, dank'al la *Enciklopedieto Japana* kaj kreskanta nombro da esperantlingvaj verkoj el Japanujo, bazajn konojn pri la japana kulturo, la amaso da detaloj — unuavice historiaj — povas konfuzi la okcidentan leganton. Kiam rakonto komenciĝas jene:

"Mi, Kanze Kozirô Nobumitu, la sepa filo de Kanze Saburô Motosige alinome On'ami, filo de Sirô Motoyasu, filo de Saburô Kiyotugu alinome Kan'ami, estas iom konata specialisto en nia arto, la noo.", oni ja ĝuas la japanan etoson, sed devas streĉi la atenton por sekvi la spuron de la intaj kaj ontaj okazaĵoj.

Ankaŭ la stilo de la aŭtoro bedaŭrinde pekas ofte per neklareco. La sintakso ie kaj tie lamas, iuj frazoj tiriĝas ĝis amplekso de duonpaĝo. Pluraj vortoj estas misuzitaj, ekzemple *malnobla* anstataŭ *nenobelo, koni* anst. *scii, domaĝi* anst. *bedaŭri, modera* anst. *modesta, furori* uzata transitive k.a. Tamen, la aŭtoro ofte manipulas tre lerte la esprimivajn eblojn de la lingvo.

Pluraj el tiuj rakontoj lumigas tre interese la rilatojn inter la artistoj kaj la politikaj aŭtoritatuloj — problemo universala, ĉiama kaj ankoraŭ aktuala en nia epoko, kiam verkistoj kaj artistoj suferas en diversaj landoj persekutojn de la cenzuristoj kaj fijuĝistoj. Plej impresaj sur tiu tereno estas "La lasta te-seanco" (la harakiro de Sen no Rikyû) kaj la priskribo de la malliberejo en "La morto de Utamaro".

Fine, kelkajn epizodojn ornamas ĝuindaj tradukoj de utaoj kaj hajkoj.

Rekomendinda libro, kies legado estas renkonto ne nur kun la japaneco, sed ankaŭ kun la homeco

Michel Duc-Goninaz (Francujo)



Miyamoto masao, aŭtoro de la novelaro "Pri arto kaj morto". Lia ĉiam kreskanta agado kiel poeto, novelisto, vortaristo, redaktoro kaj tradukisto estis eble la plej rimarkinda fenomeno de la lastatempa Esperanta literaturo.

Katalogo de la Hungarlanda Esperanto Biblioteko. Komp. György Gyuris, Szeged, 1967. 288 p. 20 x 9 cm., ofsetita.*

La ideo establi naciajn E-Bibliotekojn meritas plenan subtenon. Ĝuste tiun taskon plenumas por Hungarujo la Biblioteko en Szeged, kaj hungaraj esperantistoj faros bone, se ili plenforte subtenos kaj kreskigos ĝin. La nuna Katalogo kun siaj 1474 eroj donas superrigardon pri la ĝisnunaj akiroj (mankas tamen gazetokolektoj).

Aranĝita laŭ la decimala klasifo kun pluraj helpaj tabeloj ĝi ebligas facilan trovon. Por la Esperanta parto ni tamen insistas, ke la adapta klasifo de Butler estas pli taŭga, ĉar pli detala kaj tamen pli kurta.

Periodaj suplementoj montrantaj la amplekson de la Biblioteko estus bonvenaj.

Reinhard Haupenthal (Germanujo)

La voĉalbumo de Esperanto. (3-4) La voĉoj de s-ro Julio Baghy. Eld. Amo-Akademio, Japanujo, (1967). Fleksebla disko 33 r/m, 17 cm. diam., duflanka.* 3,— gld.

Jen alia "aŭtografo" en la voĉalbumo de Amo-Akademio. La mortinta bardo de la popola Esperanta poezio per sia karakteriza voĉo eldiras salutvortojn kaj deklamas tri siajn poeziaĵojn. "Saĉi-ko" temas pri pupo, al la verkinto donacita de japanaj geamikoj; "Deziro de grandveziro", turka fabelo pri la neeviteblo de la morto, estas trovebla en "Ĉielarko" kaj en "Ora duopo"; la melankolia "Samtempaj sezonoj" troviĝas en "Ora duopo". Laŭ la bedaŭrinda kutimo de Amo-Akademio la disko estas el tre maldika plasto (kun sekva neklareco de la voĉo); ĉarma estas la paperkovrilo kun foto kaj manskribaĵo de Baghy.

C. Soldati

VORTAROJ HISPANA, JIDA KAJ ANGLA

Poŝvortaro Esperanta-Hispana, Hispana-Esperanta, de J. Paluzie-Borrell. Eld. Sopena, Barcelona, 1967. 381 p. 14 x 8 cm.* 1,50 gld.

En la nuna stato de evoluo de nia movado en Hispanujo kaj Latinamerikaj landoj estas necesaj du kondiĉoj, por ke vortaro plenumu sian celon. Unue ĝi estu ne tro erudicia, sed dinamika ilo por trovi sen komplikoj tion, kion oni serĉas; kaj due, la prezo estu modera, por ke ĝi estu akirebla por ĉiu, kiu ĝin bezonas.

Sendube ĉi tiu vortaro, kiu en malgranda formato listigas 25 000 vortojn kun 45 000 signifoj, tute plenumas ambaŭ kondiĉojn; kun la avantaĝo, ke oni enmetis en ĝin sufiĉe grandan kvanton da terminoj el sesdeko da fakoj.

Sed kio plej forte frapis mian atenton estas, ke la aŭtoro aperigas neologismojn (kaj ankaŭ arkaismojn) sed, anstataŭ klarigi la signifon, aldonas post speciala signo la vorton preferendan anstataŭ ĝi, kies tradukon oni trovos en la koncerna loko. Tiu ĉi sistemo permesas, ke la konsultanto, se hazarde li ie legis neologismon, pere de la vortaro povas trovi la signifon, sed samtempe trovos, kiu vorto estas uzenda anstataŭ ĝi.

Krome la aŭtoro, ne inhibiciita de akademia ortodoksismo, metis en la hispana-Esperanta parto vortojn, kiuj, ne estante hispanaj, tamen estas ĉiutage uzataj, pro kio la vortaro estas pli kompleta kaj pli bone utiligebla.

Fine oni devas rimarkigi, ke la verko estas publikita de Eldonejo Ramón Sopena S.A., eble la plej grava ne nur en Hispanujo, sed ankaŭ en Ameriko.

La verko estas ne nur rekomendinda, sed rekomendenda. Hugo A. Lingua (Rosario)

The Nixon Esperanto Vocabulary. 3-a eld., SBET, Londono, 1967. 195 p. 14 x 8 cm. 2,— gld.* Vortareto angla-Esp., Esp.-angla.

F-ino Nixon estis la fondinto de la Societo. Laŭ la antaŭparolo: en la dua parto "1) ĉiuj plej komune uzataj E-radikoj kaj 2) preskaŭ ĉiuj radikoj malpli komune uzataj (ne teknikaj terminoj), kiuj ne estas tiel facile kompreneblaj por angle-parolantaj lernantoj." La aranĝo praktika kaj karakteriza. Ekz.

ELOKVENTa
ELspezi
mi EMas dormi
babilEMa
EMAJLo

El la oficialaj radikoj oni ne akceptas ekz. ABDIKi, ABITURIENTo, ABLATIVo, ... , sed troviĝas neoficiala ADEKVATa. La traduko estas konciza kaj preciza. Ekz. AKURATa punctual. EVENTUALe if need be. Kelkaj nepardoneblaj preseraroj: AGNOCKi, ARBISTRa, ... La unua parto: Trafa kaj freŝdata traduko. Ekz. CONTROL Ni regas. RESULT Rezulto (ne donas Rezultaton).

N. Kawasaki (Japanujo)

Plena Esperanto juda vortaro kaj plena juda Esperanto vortaro, de Harry Fineman. Eld. la aŭtoro, Montreal, 1966. 149 + 316 p., bind. ofset. 27,— gld.*

La librotitolo povas erarigi ne kompetentan personon. Nur en kelkaj landoj (Sovetunio, Usono, Argentino k.a.) la ankoraŭ ne asimiligintaj judoj parolas la lingvon de tiu ĉi vortaro, kiun la suplemento de P.V. nomis 'jida', difinante, ke ĝi estas "germana dialekto, miksita per hebreaj k slavaj vortoj, k uzata de la orient-eŭropaj judoj".

La grandformata vortaro de Fineman enhavas 149 dukolonajn paĝojn da Esperanta-jida parto, 27 p. da gramatiko kaj 316 p. da jida-Esperanta vortaro. Ĝi estas klare kaj bele fotopresita laŭ maŝinskribita teksto, sur bonkvalita papero. Tamen ĝi enhavas teknikajn difektojn: ne regulan uzon de interpunkcio k.s.

La Esperanta-jida parto enhavas ĝis 7000 vortoj (radikoj kun derivaĵoj), laŭ P.V., la Suplemento kaj eĉ el neologismoj ne ofte uzataj. La aŭtoro, ne estante fakspecialisto, allasis malĝustajn difinojn de diversaj fakaj terminoj. La matematikan terminon ABSCISO, ekzemple, li difinas "egaliga punkto" kaj klarigas en krampoj: "en gramatiko" (tiel!).

Ankaŭ la jida-Esperanta parto ne estas senerara rilate al difinoj, kvankam ĝi enhavas multajn trafajn interpretojn de specifaj judaj vort-nocioj. Tamen, konsiderante, ke la unua Esperanta-jida vortareto aperis en 1888 (!) kaj la antaŭlasta en (se mi ne eraras) 1908, tre maldika, kaj ke ambaŭ estas nun raraĵoj, ni povas konstati, ke la verko de H. Fineman estas ... la plej bona el ĉiuj samspecaj haveblaj. J. Kohen-Cedek (Jerusalemo)

RICEVITAJ ELDONAĴOJ

Fabelo de iu maljunulo! Eld. Soc. por Pacprosperiga Politiko de Kontraŭmilita Japanio, ĉe Mankichi-Saiko, Nishi-isaka, Uchida-machi, Naga-gun, Wakayama-ken; 1967. 12 p. 26 x 18 cm., trilingva (jap.-ang.-Esp.).

Le problème linguistique dans les relations internationales de la jeunesse / **The Language Problem** in International Youth Relations, de H. Bakker kaj W. F. Pilger. Eld. TEJO, Kastelenstr. 231, Amsterdam Z. 1967. 32 p. 29 x 20 cm., multobl. 2,— gld.

Aŭtodidakta lernolibro de l' Esperanto, de Rinĉen. 2-a eld., Scienca Akademio, Ulanbatoro, 1966 (1967). 107 p. 21 x 14 cm., ofsetita. 3000 ekz. Por mongoloj.

Novaj Esperanto-historietoj, de diversaj aŭtoroj. Eld. Dansk Esperanto-Forlag, Aabyhøj. Represo 1967. 70 p. 20.5 x 15 cm. 4,50 gld.*

Kien floroj? Modernaj popolkantoj. Tr., komp. Konisi gaku. Eld. KLEG, Oosaka, 1967. 12 p. 25,5 x 18 cm., kun muziknotoj.*

Vojo-aboco de Hungarujo. Eld. Landa Fremdultrafika Oficejo, Budapest, 1966. Ok kajeroj, entute 128 p., kun mapoj. 18 x 12 cm.

ESPERANTO SERVIS EN KRIZA HORO



Kastelo Grésillon, la serena ripozejo en Francujo, kie komenciĝis la persona dramo de s-ro Mee

Malmultaj havas la sperton uzi Esperanton en horo de vera krizo, tragedio aŭ dramo. Antaŭ nelonge tio okazis al mi, kaj, pro la fakto, ke la lingvo estis bonega helpo al mi, mi multe deziras nun redoni al la movado miajn dankojn.

Dum la pasinta somero mia edzino kun la malpli aĝa filino vizitis Londonon kaj tie restis dum du-tri semajnoj. La pli aĝa filino vizitis familion de amikino en Nederlando, kaj la plano enhavis kaj restadon en Amsterdamo kaj vagadon per bicikloj tra Nederlando kaj Belgujo.

La patro, mi mem, la sola esperantisto en la familio, vizitis la kastelon Grésillon, en la plej bela parto de Francujo. Por fari la vojaĝon mi portis mian skoteron per la trajno de la hejmo en Skotlando ĝis Londono, veturante dum la nokto, kaj poste uzis ĝin por atingi la marbordon en suda Anglujo.

Post veturo per ŝipo trans la markolon, mi denove uzis la skoteron por atingi la Esperantistan Kulturdomon. Mi havas nur la Esperantan kaj la anglan lingvojn.

Subita voko telefona

Pasis pli ol unu semajno, tute kontentiga, tute saniga, en afabla rondo, en ĉarma loko sub brileganta suno. Sed venis la drama momento. Malfrue en la vespero la telefono sonoris, kaj oni vokis min por ricevi mesaĝon. Estis la edzino, nun denove hejme post la restado en Londono. Ŝi ricevis mesaĝon, ke la pli aĝa filino spertis strat-akcidenton kaj nun kuŝas en hospitalo en tute nekonata urbo en Nederlando. Mankis detaloj, sed verŝajne la vundoj estas gravaj, kaj estus saĝe, ke mi veturu al la hospitalo.

Revenante al la rondo de geamikoj mi min demandis, kion fari. Sed kiam iu nederlandano vidis la mallongigitan nomon de la nekonata urbo, li diris "Ha! estas 's-Hertogenbosch. Mi konas tiun urbon." La unua problemo malaperis. Alia amiko, franco, montris la landkarton kaj diris "Uzu la vojon tra Abbeville kaj Lille; ne veturu tra Parizo por ne malŝpari tempon." Do, post nur du minutoj mi sentis, ke mi bone konas la tutan vojon.

En la Jarlibro mi trovis kaj la urbonomon kaj la nomon de la UEA-delegito. Subite miaj duboj kvazaŭ vaporiĝis. Mi bone sciis nun, ke mi ne veturos al nekonata urbo. Mia koro malpeziĝis.

Kaj nun, post profunda dormo dum kelke da horoj, sekvis longa veturado sur la malgranda skotero, kaj feliĉe la maŝino tute ne malfidelis. Dum dudek unu horoj la motoro zumadis preskaŭ senĉese, ĝis finfine mi atingis la malplenajn stratojn de 's-Hertogenbosch. Policano gvidis min al la hospitalo, kaj nun, malpli ol tridek ses horojn post la akcidento, mi vidis la filinon. Kia ĝojo kaj por mi kaj por ŝi! Por mi, ĉar mi tuj konstatis, ke ŝiaj vundoj, kvankam gravaj, ne estas mortigaj. Kaj ŝi ricevis konsolon de la konata vizaĝo, ĝuste kiam ŝi plej bezonis tion, post turmentoplena nokto.

Helpo de la Delegito

Pli poste en tiu tago Esperanto denove ludis gravan rolon. S-ro Hoedelmans, la delegito, estis senfine afabla, tuj kiam li konstatis, ke mi bezonas helpon. La simplajn aferojn pri loĝado ktp li tuj aranĝis, kaj poste li veturigis min al najbara vilaĝo, kie okazis la akcidento. Tie, dum longa serioza interparolo pri la akcidento kun la policestro, li tiel bone tradukis, ke kaj la policestro kaj mi sentis kontenton, ke eĉ la plej gravaj punktoj estas tute komprenataj ambaŭflanke.

S-ro Hoedelmans vizitis la hospitalon, kompreneble, kaj per tio donis helpon al la filino. Ŝi tuj konstatis, ke de nun ŝi havos kvazaŭ parencon en la urbo, eĉ kiam la patro devos foriri.

Ĉi tiujn vortojn mi skribas du semajnojn pli poste. Nun mi konstatas, ke la filino ankoraŭ faras bonan progreson kaj post nelonge povos reiri al sia hejmo. Do la dramo pasas, sed por mi la sperto restos dum longa tempo.

Mi ricevis tute neantaŭviditan pruvon pri la efikeco de la lingvo en cirkonstancoj, kiuj facile subigus min sen tiu granda helpo. Al la movado kaj al la tre afablaj personoj, kiuj min helpis, mi esprimas miajn sincerajn dankojn.

Lawrence Mee

LAŬLANDE

Finnlando

• La Universitato de Helsinki decidis enkonduki instruadon de Esperanto ekde 2 okt 67. Kursojn elementan kaj superan gvidos po 2-foje semajne mag. Vilho Setälä. La instruadon ebligas donaco de la dumviva membro de UEA, prof. d-ro Vilho Väisälä. La Universitato estas la sola en Skandinavio, kiu oficiale instruas la lingvon.

Germanujo

• La Universitata Biblioteko de Saarbrücken fondis Esperanto-fakon, por kiu ĝi bonvenigas ĉiaspecajn donacojn de libroj kaj revuoj. Donacojn oni provizore sendu al Sarlanda Esperanto-Ligo, D-6653 Blieskastel, Schlossbergstr. 51, kiu ordigos kaj transdonos.

Italujo

• Senpaga vizito al la itala urbo Montecatini rekompencos la venkintojn en internaciaj konkursoj literatura kaj ĵurnalisma. Detalajn informojn sendas Esperanto-Grupo Pistoia, ĉe Ente Provinciale per il Turismo, Corso Grausci 110, I-51100 Pistoia, Italujo.

Kanado

• Okaze de la 50-jara datreveno de la morto de Zamenhof, Kanada Esperanto-Asocio starigis nacian Esperanto-bibliotekon en Ottawa kun ĉ. 2500 eroj.

Polujo

• Scenoj el la Internacia Studenta Esperanto-Seminario en Lodzo kaj el la Esperanta prezento de la dramo "Cimo" de Majakovskij fare de moskvaj studentoj aperis per Pola Film-Kroniko en ĉiuj polaj kinejoj kaj en pola televido.

Skiantoj apud Adelboden (vd. Svislando)



Soveta Unio

• Ĉar lokaj inundoj malebligis la Uzbekistanan Esperanto-Tendaron en Ĥamzaabad, la respublika registaro donacis al la 150 eksterlandaj aliĝintoj (el Hungarujo, Polujo kaj Germanujo) 8-tagan turisman vojaĝon tra Taŝkent, Samarkand, Almalik k.a. lokoj, je suma valoro de 10 000 rubloj.

Svislando

• Jam la 11-an fojon okazos internacia skirestado en Adelboden en la Bernaj Alpoj, inter montoj 3000-metraj. Datoj: 26 dec 67 ĝis 4 jan 68. Informas: Esperanto-Edukistaro de Svislando, Miéville 133, CH-2314, La Sagne (foto).

LAŬFAKE

Filatelo

• La Ĉeĥoslovaka Poŝtministerio emisiis ĉimonate 5-koloran poŝtmarkon de 5 kronoj kun tekstoj ĉeĥa kaj Esperanta: "Tutmonda Ekspozicio de Poŝtmarkoj Praha 68". Ĝi aperis kiel folieto po 4 markoj kun meza kupono. Ĝi estas la 49-a poŝtmarko (inkluzive variaĵojn) kun Esperanta teksto; eldonis tiajn pm. entute 8 landoj.

Fotografio

• "Kio plaĉis al mi en Hungario?" estas la temo de fotokonkurso, kiun organizas la Hungara Landa Fremdultrafika Oficejo. Premioj inkluzivas televidaparaton, dusemajnan libertempadon k.s. Limdato: 31 dec 1967. Informas detale: Árpád G. Pölöskey, Budapest, XI., Puskás tér 13.

Geologio

• En la lasta Internacia Geologia Kongreso (Kopenhago) traduko kaj interpretado kostis entute 107 000 kronojn, t.e. 10% de la tuta kongresbuĝeto. Anticipe al la venonta IGK (Praha 1968), en kies kadro kunvenos la geologia sekcio de ISAE, ISAE klopodas aldonigi Esperanton al la 6 oficialaj kongresaj lingvoj.

Literaturo

• La vjetnama rakontaro "Meze de l' flamoj" ĉijare aperis en la japana lingvo ĉe Eldonejo Oriento. Tradukis ĝin el la Esperanta eldono kolektivo. En 1965 aperis, same tradukita per Esperanto, la romano "Franjo Tu Haŭ". Ĝis nun ambaŭ japanaj eldonoj vendiĝis en kvanto de pli ol 10 000 ekz.

Sennaciismo

• La 40-an SAT-kongreson en Malmö (Svedujo) julifine ĉeestis 407 el 467 aliĝintoj el 18 landoj. La kongreso de 1968 okazos en Utrecht (Nederlando).

Turismo

• Aperis novaj prospektoj en Esperanto pri Szeged (Hungarujo), Helsinki (Finnlando), Liptovský Mikuláš kaj ekspoziciaj foiroj Liberec-Jablonec (Ĉeĥoslovakujo), 2282-List (Germanujo) kaj pri Irlando (Bord Failte Eireann, P.O.Box 273, Dublin 2).

53-a UNIVERSALA KONGRESO DE ESPERANTO

Madrid, 3-10 aŭgusto 1968
Alta Protektanto: Ĉef-Generalo Francisco Franco, Ŝtatestro de Hispanujo.
Konstanta Adreso: Nieuwe Binnenweg 176, Rotterdam-2, Nederlando.

OFICIALA KOMUNIKO

N-ro 2 Rotterdam, 9 okt 1967

Kotizo
Kiel menciite en la Unua Bulteno kaj en la Aliĝilo, la aliĝkotizo devas esti antaŭpagita kaj ne estas repagebla, eĉ se la aliĝinto ne partoprenas la Kongreson. Pri tio ĉi ni speciale atentigas la personojn, kiuj intencas pagi la kotizon por alia persono.

Limdato
Ni atentigas, ke la aliĝoj estas akceptataj ĝis la 25-a de junio 1968. Aliĝiloj, kiuj atingos la kongresajn perantojn aŭ la konstantan adreson post tiu dato, ne estos traktitaj.

Infana Kongreseto
Samtempe kun la Universala Kongreso okazos la 11-a Internacia Infana Kongreseto. Rajtas partopreni infanoj de 6 ĝis 13-jaraĝaj. La kotizo, kiu inkluzivas ĉiujn kostojn dum la tuta semajno, estas 45,— gld. Informoj kaj aliĝiloj estas riceveblaj ĉe la konstanta adreso de la Kongreso.

Ekskursoj
La Loka Kongresa Komitato antaŭvidas tuttagajn ekskursojn al Escorial, Segovia kaj Toledo. Kvintaga Postkongreso okazos en Zaragoza. Detaloj aperos en venontaj oficialaj komunikoj kaj en la Dua Bulteno.

Arta Festivalo
Artistaj grupoj aŭ individuoj, kiuj deziras partopreni en la programo, povas sin anonci ĉe la konstanta adreso ĝis la 1-a de januaro 1968. Por ke L.K.K. povu decidi pri la sinproponoj, necesas, ke al ili estu aldonitaj rekomendoj de kompetentaj personoj aŭ instancoj kaj konkretaj pruvoj pri la nivelo de la sinproponintoj.

Statistiko (ĝis 9/10/1967)
Arg. 1, Aŭstral. 1, Aŭstr. 1, Belg. 6, Braz. 2, Brit. 14, Bulg. 10, Ĉeĥ. 1, Danl. 2, Finnl. 3, Franc. 21, Germ. 7, Grek. 1, Hisp. 24, Hung. 5, Ital. 10, Jap. 3, Jug. 14, Kan. 3, Monako 1, Ned. 15, Norv. 3, Nov-Zel. 1, Pol. 8, Port. 2, Sved. 12, Svis. 2, Usono 9. Entute 182 el 28 landoj.

G. G. Pompilio
Konstanta Kongresa Sekretario

MEMORIGA KALENDARO

Decembro
10 Tago de Homaj Rajtoj
15 Zamenhof-Tago. Libro-Tago.
26-4/1 Skiferioj en Adelboden, Svisujo
27-3/1 Int. Seminario GEJ, Würzburg, Germ.
31 Kotizoj por UK Madrid plialtiĝas

Januaro 1968
1-7 Aŭstralia Kongreso, Manly, N.S.W.
8-12 Nov-Zelanda Kongreso, Whangarei

Februaro
3-10; 10-17 Int. Skisemajnoj, Innsbruck

Marto
2-3 Jarkunveno Svisa E-Soc., Aarau
30-2/4 Int. Studenta Seminario, Toruń, Pol.
31 Limdato de Belartaj Konkursoj
Kotizoj por UK Madrid plialtiĝas

Aprilo
12-15 Brita Kongreso, Manchester
30 Limdato kandidatiĝo Int. Ekzameno

Majo
11-17 IFEF-Kongreso, Varna, Bulgarujo
31-4/6 Germana Kongreso en Munkeno

CITAĴO

"De Tijd", Amsterdam, komentis pri komunaj ekzercoj de la nederlanda kaj germana armeoj: "Ne ekzistas militista lingvaĵo, per kiu trupoj de la landoj de OTNA (Organizaĵo de la Traktato de Nord-Atlantiko) povus klarigi unu al alia, kion ili volas. En reala milito la nepovo interkompreniĝi povus havi katastrofajn sekvojn. Ankaŭ lingvaj baroj kaŭzis, ekzemple, ke nederlandaj teknikistoj bezonis multe pli da tempo por konstrui ponton sur la rivero Weser, ol ili planis."

ESPERANTO EN RADIO

ESPERANTO EN RADIO

Informojn pri radio sendu al s-ro G. Larglantier, 29 Bd. Murat, F-75-Paris (16e), Francujo. Por aliaj detaloj vidu la oktobran eldonon.

RADIO ROMA. 5-XI, Tra la literaturo; 12-XI, Novaĵoj el Italujo; 19-XI, Italaj kanzonoj en Esperanto; 26-XI, Leterkesto; 3-XII, La itala poeto Pietro Metastasio; 10-XII, Montecatini, la urbo de la 39-a itala Esperanto-kongreso; 17-XII, La itala pentristo Amedeo Modigliani; 24-XII, La Kristnaska poezio de S. Alfonso de Liguori; 31-XII, Kristana mondo. La dua parto de ĉiu dissendo estas dediĉata al "Kuriero de Esperanto". Redaktoro: Luigi Minnaja.

RADIO WIEN nun prezentas sian programon nur ĉiun alternan vendredon, sed dum 15 minutoj. Ĝis la fino de la jaro la programoj estas anoncataj la 3-an kaj 17-an de novembro, la 1-an, 15-an kaj 29-an de decembro, de 14.30 ĝis 14.45 per ondo 203 m (1475 kcs). Ĉiuj aŭskultantoj estas petataj sendi raporton, opiniojn, sugestojn al Radio Wien, Argentinierstr. 30a, Wien IV, Aŭstrujo.

RADIO BILBAO dissendas sian merkredan programon pli frue, de 23.05 ĝis 23.30 per sama ondlongo: 212 m (1412 kcs). Raportoj pri aŭskultado al Radio Bilbao, Apartado 1117, Bilbao, Hispanujo, estos bonvenaj.

POLA RADIO en Łódź, la unuan sabaton de ĉiu monato, prezentas programon pri Esperanto en la pola lingvo de 17.55 ĝis 18.20 per ondo 202m (1484 kcs). La programo estas ripetata la sekvantan merkredon de 14.00 ĝis 14.25 per ondo 219 m (1367 kcs). Kelkaj eroj de la programo estas parolataj ankaŭ en Esperanto.

LA JUNA VIVO

Oficiala organo de Tutmonda Esperantista Junulara Organizo. Materialojn por "La Juna Vivo" sendu al H. Bakker, Kastelenstraat 231, Amsterdam Z, Nederlando

BRAZILA ESPERANTISTA JUNULARA ORGANIZO

Post BEJ kaj BEJA, nun ankaŭ ekzistas BEJO: la 30-an de julio 1967 ĝi fondiĝis en Santos Dumont dum la Unua Renkontiĝo de Junaj Esp-istoj. Deklaron pri la fondo entuziasme subskribis 20 gejunuloj el 6 brazilaj provincoj. Nejunuloj en la Renkontiĝo subskribis apartan deklaron, kiel membroj-protektantoj de BEJO. Oni esperas, ke BEJO havos baldaŭ 40-50 membrojn, ĉar jam dum du jaroj laboro estas farita en Brazilo por prepari la fondon.
Oni pritraktis ankaŭ la aliĝon al TEJO, kaj decidis aliĝi tuj post la stabiliĝo de BEJO. La laborprogramo enhavas jenajn ĉefajn punktojn: Programo Pasporto, Biblioteka Fonduso, Koresponda Servo, Propaganda Fako, Kongresa Fako, Rilatoj kun NEJOj, kaj agado en studentaj kaj lernejaj medioj.
La gazeto de BEJO: "Impulso" aperos dumonate, 8-paĝe, abonebla por eksterlandanoj kontraŭ Esp.-libro.
Adreso de BEJO estas: Caixa Postal 18 –ZC 00, Rio de Janeiro, Brazilo.

(Rap.: P. S. Viana, sekr.)

SEK FESTIS LA JUNULARAN TAGON

En Zagreb kaj Kumrovec kunvenis en majo 80 gejunuloj por festi la duan Tutjugoslavian junularan esp-istan renkontiĝon, la 80-jaran ekziston de Esperanto kaj la dekjaran aĝon de Studenta Esp. Klubo el Zagreb.
Jam dum la interkona vespero la fama Drama Sekcio de SEK devis labori. La prezidanto de SEK festparolis kaj "elektra ensemblo 'Sorĉistoj'" elektrumis.
Sekvan tagon grupoj konkuris per dancoj, kantoj, skeĉoj, deklamoj kaj kvizoj. Ŝarĝite de premioj kaj diplomoj oni poste gaje ekskursis. Resume, la aranĝo brile sukcesis. La financan kaj organizan flankon prizorgis SEK preskaŭ sola, kaj tute perfekte. Aperis kvar artikoloj poste en la plej grandaj zagrebaj ĵurnaloj. La dua parto okazis la 25-an de majo, honore al la Junulara Tago, ĝuste tiudata. Tiam JEJA, surbaze de raportoj de junularaj Esp.-grupoj, transdonis pokalon al la pasintjare plej aktiva junulara grupo de Jugoslavio.

(rap. Tiŝljar Zlatko)

ARGENT-EJO PLUE LABORAS

La juna, argentina sekcio de TEJO raportas pri vigla vivo: kursoj (kun diskutoj kaj primovadaj informoj), radioprogramoj dum kvaronhoro ĉiusemajne, revueto "Perspektivo" (nun dumonata), Fonduso Hejma Biblioteko (peras abonojn kaj aĉetojn de libroj), Programo Pasporto (aperis stencilita informilo), kaj preparoj por la dua kongreso de ArgEJO. Aparte sukcesa estis la prezento ĉe la Kristana Asocio de Junuloj (YMCA) de du filmoj "Nokto kaj Nebulo" kaj "U.N. kaj paco", kun postaj prelegoj de kvar elstaraj profesoroj pri la temo "Ĉu homo estas kontraŭ homo?". Ĉiuj ĵurnaloj varme reagis. En Bonaero nova grupeto organiziĝis en la kadro de ArgEJO.
ArgEJO ĉiam bonvenigas materialojn por la kurso, kaj librojn, revuojn, ktp. por sia biblioteko.

(rap. R. Feldman Gonzalez)

FRAŬLINO SIMPATIA, GEJ/1967

Tiun titolon akiris Leryde Maria, kiu kun la dualoke premiita Cecília Bernardes aperas sur ĉi tiu foto. Ili estas membroj de Guanabara Esperanto-Junularo, la loka sekcio (en Rio de Janeiro) de la nova BEJO, kaj unu el ĝiaj ĉefaj fondintoj. GEJ gvidas plurajn kursojn, kunlabore kun Kultura Kooperativo de Esp-istoj en Rio, eldonadas la gazeton "Meteoro", okazigas festojn kiel dancvesperojn, promenadojn, la jaran "Nokto de la Poezio" ktp. Krom tio, en monataj kunvenoj, oni prezentas muzikon, deklamas, rakontas anekdotojn, prelegas, debatas, faras Esp-testojn, ktp.

(rap. A. Sartorato)

Alridetas vin Leryde Maria (dekstre) kaj Cecília Bernardes, unualoke kaj dualoke elektitaj, respektive, kiel "Fraŭlino Simpatia" de Guanabara E-Junularo.

HEREDAĴO ROLF PETER LAUFEN

Kiel jam anoncite en la januara numero de "Esperanto" 1967, ĉ. la 9-a de septembro 1966 mortis en Montréal, Kanado, la nur 28-jara dumviva membro de UEA, sinjoro R. Peter Laufen.

Antaŭ kelkaj jaroj s-ro Laufen translokiĝis de Germanujo al Kanado. Estante ankoraŭ tre juna li decidis fari testamenton antaŭ notario en Québec. En tiu testamento li esprimis sian deziron, ke granda parto de lia heredaĵo iru al Universala Esperanto-Asocio.

En februaro 1966 s-ro Laufen devis submetiĝi al grava kor-operacio. Tiun operacion li bone trapasis, kaj ŝajne li poste estis tute sana. Tamen, ĉ. la 9-a de septembro 1966, subite venis la morto.

Dum sia vivo s-ro Laufen laboris por la disvastigo de la Internacia Lingvo. Li sciis, ke ĉiam unu el la plej grandaj malfacilaĵoj por UEA estas la manko de mono. Pro tio lia deziro estis, ke post la morto lia mono donu helpon al UEA, por plenumi ĝian grandan taskon.

La heredaĵo, kiu sumas 8873 kanadajn dolarojn (aŭ egalvaloron de 29678 nederlandaj guldenoj) jus alvenis en la C.O. de UEA. La nomo de s-ro R. Peter Laufen, same kiel tiu de s-ro A. M. Hyde (vidu oktobro, p. 147), restos por ĉiam en la Ora Libro de UEA.

E. J. Woessink, estrarano pri financoj

LA INTERNACIAJ KONKURSOJ 1967

stato je la 30-a de septembro 1967

Konkurso I

Lando			Kvoto	Poentoj	%
1	(7)	Hispanujo	3250	2935	90,31
2	(15)	Japanujo	3965	3560	89,79
3	(12)	Italujo	4220	3740	88,63
4	(9)	Svedujo	7180	6160	85,79
5	(3)	Francujo	7752	6629	85,51
6	(2)	Nederlando	5975	5106	85,46
7	(1)	Belgujo	2055	1740	84,67
8	(13)	Danlando	3099	2601	83,93
9	(4)	Germanujo	7221	5950	82,40
10	(5)	Britujo	6691	5489	82,04
11	(6)	Usono	4526	3650	80,65
12	(8)	Finnlando	3160	2300	72,78
13	(10)	Svislando	2459	1655	67,30
14	(11)	Jugoslavio	5375	3345	62,23
15	(14)	Brazilo	3856	2222	57,62

Konkurso II

1	Kanado	1124	1251	111,30
2	Islando	250	260	104,—
3	Aŭstrujo	1475	1245	84,41
4	Aŭstralio	1475	1219	82,64
5	Sudafriko	260	200	76,92
6	Nov-Zelando	1481	1103	74,48
7	Israelo	595	365	61,34
8	Grekujo	270	165	61,11
9	Norvegujo	1755	1060	60,40
10	Argentino	905	540	59,67
11	Madagaskaro	250	143	57,20

(Vidu la regulojn sur paĝo 33. Interkrampaj ciferoj indikas pasintmonatajn poziciojn.)

NOVAJ DELEGITOJ

Aŭstrujo

Graz. FD (Juro): D-ro Klaus Perko, ŝtatoficisto, A-8010 Graz, Glacisstr. 1/III; tel. 32 84 64.

Belgujo

Antwerpen. FD (Instruado: muziko): Jo Haazen, muzikisto, Maalderstr. 16; tel. (03) 320502.

Brazilo

Salvador. FD (Komerco): Godofredo Araujo Goes, komercisto, Rua S. Agostinho, 85-ap. 4 (aŭ Caixa Postal 945).

Britujo

Derby. FD (Edukado): F-ino Florence J. Elliott, ĉefinstruistino, 17 Askerfield Avenue, Allestree; tel. 59728.

Keighley (Yorks.) 56 000. D: Bruno Najbaro, teksaĵ-teknologo, 2 Mackingstone Drive, Oakworth, Nr. Keighley.

Wakefield. FD (Instruado: Esperanto): la D.

Watford. D & FD (Edukado), (Lingvoj) & (SOS-aŭto-servo): Grahame Smith, instruisto de lingvoj, "Holstein House", 801 St. Albans Road; tel Garston 2220.

Ĉeĥoslovakujo

Brno. FD (Arkitekturo): Jan Werner, inĝ.-arkitekto, Kroftova 84, Brno 16.

Levice (Slovensko) 14 000. JD: Peter Holba, studento, str. "28 oktobro" n-ro 27.

Žilina-Závodie (Slovensko) 40 000. D: Miro Závodský, oficisto, Žilina-Závodie 197.

Finnlando

Helsinki. VD (Helsinki 35): Anni Ahvenainen, instruistino, Ulvilantie 19 c B 61; tel. 90-454347.

FD (Lingvoj slavaj): Veli Kolari, bibliotekisto, Suvilahdenk. 1 A 26, Helsinki 50.

FD (Radio-amatorismo): Ove Jägermalm, inĝ., Helsinki 63, Töyrytie 7 E 30; tel. 747996. Voksigno 0H2KL.

Jyväskylän maalaiskunta (Keski-Suomen lääni) 20 000. D & FD (Konstruado) & (SOS-aŭto-servo): Aulo Minell, Konstru-inspektoro, Tikkakoski; tel. 941-32316 (hejmo); 941-14660 (oficejo - Minell).

Germanujo

Herzberg (Harz) 12 000. D & FD (Fervojo): Joachim Giessner, fervoja oficisto, Bahnhof, D-342 Herzberg.

Ichenheim (Baden-Württemberg) 2 200. JD: Elvira Wieners, oficistino, D-7635 Ichenheim, Kreuzstr. 1; tel. 07807/312.

Hispanujo

Barcelona. D: Alfonso Tur Thomas, industria teknikisto, c/. Energia, Ltr. B, 1º-1a.

FD (Komerco: Legomoj): Josep Alberich-Jofre, reg. komerca agento, Berga 21, Barcelona-12; tel. 228-75-66.

FD (Turismo): Joaquin Mallach, oficisto, Avila nº 90 - Entr. 3a; tel. 2454763.

Italujo

Bienno (Brescia) 4 000. D: Ermanno Mello, studento. Via S. Maria 15.

Como. FD (Konstruado: ŝoseoj) & (Naturismo): Claudio Foà, inĝ., Via Belvedere 14, I-22070 Grandate; tel. (031) 45148.

FD (Transportoj publikaj): la D.

Roma. FD (Medicino: naturkuracado): Gianfranco Guidi, Via Salaria 213, I-00198 Roma.

Japanujo.
Hirosaki (Aomori-ken) 150 000. D: Takaŝi Macumoto, asistprof. de kolegio, Ĉe Hirosaki Gakuin Tankidaigaku, Sakamotoĉo 5; tel. (2) 8768 aŭ (2) 7218.
Kyoto (Kyoto-hu) 1 350 000. D: Seija Iĉiki, altlerneja instruisto, Sookokuĵi-Higaŝimonzenĉo, Hokubu 698, Kamikyo-ku; tel. 21-0645.
Jugoslavio
Zadar. JD: Ĉiril Stojanov, meĥanikisto, Kukljiĉka 8.
Kanado
Sherbrooke (Québec) 75 000. D: Roméo Saint-Pierre, inspektoro, 2000 Bretagne-str.; tel. 819-5625561.
Trois-Rivières. VD: Monique Milette, sekretariino, 1532 Royale; tel. 374-4912.
Pollando
Kraków. D: la FD (Folkloro pola).
Pierściec (woj. Katowice) 1000. D & FD (Metioj: presado): Tadeusz Grzybek, presisto, Pierściec 221, p-ta Skoczów, pow. Cieszyn; tel. 12-05 (oficejo).
Poznań. FD (Sporto) & (Turismo): Borys Wierzejewski, ekonomiisto, str. Klonowicza 6 m 5; tel. 631-66.
Svedujo
Norrköping. FD (Edukado: aŭd-vidaj instruiloj) & (Radio-amatorismo): Kaj Yngve Stridell, ĉefo de centro de aŭd-vidaj instruiloj), Box 2080, Norrköping 2 (Luntgatan 13 A); tel. 18 84 73 (laborejo: 13 96 80/50). (Voksigno SM 5 DAD).
Svislando
CH-3714 **Frutigen** (Berner Oberland) 4700. D: Johann Schaltegger, emerito, Tellenfeld.
Usono
Las Vegas. FD (Muziko): Dennis Havens, muzikisto, 709 Osprey Circle; tel. 870-3263.
Minneapolis. D: la antaŭa VD (Swenson).
FD (Literaturo: verkado): la antaŭa D (Wendell).

NE PLU VALIDAS (en Jarlibro 1967)

Aŭstrujo. Knittelfeld: FD (Turismo).
Brazilo. Recife: FD (Bankoj) & (Religio: spiritismo). Salvador: FD (Religio: kr.).
Britujo. Ashurst. Canterbury. London: FD (Komerco). Watford: D & FD (Presado).
Ĉeĥoslovakio. Bratislava: FD (Instruado) & (Muziko). Košice: FD (Arkitekturo).
Danlando. Helsingør: JD.
Finnlando. Järvenpää. Tikkakoski.
Francujo. Bezons.
Germanujo. Elze. Fulda: VD. Mainz.
Jugoslavio. Sanica. Zagreb: JD.
Nederlando. Arnhem: FD (Edukado).
Nov-Zelando. Wanganui: VD.
Pollando. Kraków: D.
Usono: Minneapolis: D (Wendell), VD (Swenson). Richland. Stillwater.

MEMBRO-SUBTENANTO 1967

302 Jahn, s-ro C. J., Danlando.

DONACOJ POR ĜENERALA KASO (Gld.)

Germanujo: Lendel, s-ino Dora, 8,—. Nederlando: Moerbeek, s-ro R., 100,—; Smits, s-ro H., 10,—.

POR VASTIGO DE LA AGADO (JARO DE INTERNACIA KUNLABORO, JARO DE LA INTERNACIA LINGVO ESPERANTO)

Japanujo: Harada, s-ro Hideki, 3,50 gld.
Nederlando: Klage, inĝ. D., 2,50 gld.

Sumo entute ricevita:	26 585,37 gld.
Sumo elspezita:	25 851,54 gld.
Saldo pozitiva:	733,83 gld.

DONACOJ POR LA 52A UNIV. KONGRESO

Britujo: Simpkins, s-ro W. L., 99,36 gld.
Al ĉiuj donacintoj plej varman dankon pro ilia granda helpo.

M. H. Vermaas,
Direktorino C.O.

ANONCETOJ

Kial Ne? La inteligenta Esperanto-gazeto por modernaj gejunuloj. Leginda — pensiga — satirema. Unuvorte — la sola gazeto por raciaj homoj. Jarkotizo: 20 steloj/10 ŝilingoj. 'Kial Ne?', 2 Edwina Gardens, Redbridge, Ilford, Essex, Anglujo.

Publika dankesprimo al S-ro F. Orlandini, del. UEA en Mondovì-Cuneo, kiu sindoneme oferis sian tempon kaj sperton por ebligi al ni plej agrablan restadon en la bela regiono de Mondovì-Vico-Forte; Geedzoj Kreibig, Nice.

20-jaraĝa studento deziras korespondi tutmonde. Paul Kellett, D Block, Hawthorns, Keele, Newcastle, Staffordshire, Anglujo.

Adreŝanĝo: S-ro M. Rétot, eldonanto de Universala Revuo kaj Esperanto-Parolata, nun loĝas: 11 Boulevard Davout, Paris-20.

Ĉu vi estas ĝuste informita pri la katolika eklezio kaj ĝia tutmonda agado? Abonu la organon de I.K.U.E., ESPERO KATOLIKA. Jarkotizo svisaj fr. 13.— Mendebla ĉe: Centra Oficejo de IKUE, Ch-9106 Zürchersmühle, Svislando.

Religia kaj katolika literaturo estas mendebla ĉe la eldonejo EKUMENA ESPERANTO, Ch-9106 Zürchersmühle, Svislando. Petu libroliston.

S-ro Raif Markarian volas sincere danki al ĉiuj, kiuj sendis kondolencojn okaze de la subita forpaso de lia edzino la 1-an de julio.

En Sovetunio fondiĝis Koresponda Servo de junaj sovetaj esperantistoj. Kiuj deziras trovi junajn korespondamikojn en Sovetunio bonvolu sin turni al estro de KS: Kazancev Leo, p.k. 10, IVANOVO-centr, USSR. Al la sama adreso oni sin turnu en okazo de eblaj nerespondoj.

La Poŝtmark-kolektado daŭras. Propono: sendu poŝtfreŝajn seriojn de via lando. Tiaj ofte havas pli da valoro, ol tio, kiom mem pagis por ili. Sendu daŭre al Peter Arno (por UEA), Åmosevej 5 A, Kopenhago B, Danlando.

Se vi serĉas seriozajn gekorespondan ojn, ĉu individuajn, ĉu sur kolektiva bazo (ekz. por lernejo) turnu vin al la Koresponda Servo de UEA, adreso: K.S.M., 12, Rue des Jacobins, F-63-Clermont-Fd., Francujo, kiu peras adresojn laŭ la regularo en la Jarlibro.

LINGVOLOGIA REVUO

Esperantlingva fakeldonaĵo por lingvologio, la ekzakta lingvoscienco kalkuleca. La kvara numero aperis. Specimenoj haveblaj senpage malal la eldonanto kaj redaktoro Emil Hanhiniemi, P.O. Box 764, Ingham, 4850-N-Queensland, Aŭstralio.

Lingvologio - la nova lingvoscienco ekzakta.

Ne forgesu

LA TAGON DE LA HOMAJ RAJTOJ:

10 DECEMBRO

Distribuu la Esperantan tekston de la Universala Deklaracio de Homaj Rajtoj, kies dua eldono ĵus aperis.

Vi pagas nur la sendokostojn: por 25 ekz. 2 int. respondkuponojn (0,90 gld); por 50 ekz. 4 rpk.; por 100 ekz. 6 rpk.; por 200 ekz. 8 rpk.

Mendu ĉe la Centra Oficejo de UEA

IMPERATIVOJ DE LA VIVO

de

H. Rohden

Kristana orientigo por la ĉiutaga vivo.

La aŭtoro parolas al la tuta kristanaro pri la regno de la ĉielo.

Libro nepre legenda de ĉiu esperantisto.

Prezo unu dolaro aŭ egalvaloro.

Mendebla ĉe la Libro-Servo de U.E.A. aŭ

LIVRARIA SABEDORIA

Rua Senador Dantas, 117-E

Rio de Janeiro - Brazilo

UNIKA VORTARO

ESPERANTO-JUDA KAJ JUDA-ESPERANTO

de

Harry Fineman

Plena vortaro por parolantoj de la juda (judgermana) lingvo. Bele ofsetita kaj tole bindita. Grandformata, 149 plus 316 du-kolumnaj paĝoj, 22 x 18 cm.

"Enhavas multajn trafajn interpretojn de specifaj judaj vort-nocioj" (J. Kohen-Cedek).

Prezo: 27,— gld. plus afranko

MENDU ĈE LA LIBROSERVO DE UEA



IVO LAPENNA

ELEKTITAJ PAROLADOJ KAJ PRELEGOJ

Formato 20 x 15 cm (kiel Retoriko)

Bindita, 152 p. Prezo 11 Gld. aŭ egalvaloro

Mendebla ĉe U.E.A.

La Unua Parto konsistas el 16 paroladoj faritaj inter 1950 kaj 1966. La Dua Parto enhavas tri prelegojn: pri la lingva problemo en la internaciaj rilatoj, D-ro Zamenhof kaj U.E.A.

"Sobreco sen sekeco ... Akra kiel razilo ... Lapenna en siaj paroladoj intelekte analizas esencajn aspektojn de la lingva problemo kaj de la Movado. ... Tiu ĉi studaĵo (pri la lingva problemo en la internaciaj rilatoj) estas tiel dokumentoplena, donanta la historian fonon por la disvolviĝo de la problemo, ke ĝi tre nete kondukas al tiuj konkludoj, por kiuj ni pledas. Ĝi estas unu el la plej konvinkaj informaj artikoloj pri Esperanto, kiujn iam ajn mi legis."

Paul Neergaard en "Esperanto"

"La ĉi tie elektitaj paroladoj kaj prelegoj estas veraj, vivantaj, florantaj verkoj de retoriko ne nur por la oreloj; ankaŭ por la okuloj ili kvazaŭ sonas, sonoras, ŝvebas tra la atmosfero, kaj oni bezonas nur fermi la okulojn por ree havi la plenan orelan ĝuon pri la jam famaj oratoraĵoj." J. F. Berger en "G.E.R."

"Kiuj konas Prof-ron Lapenna kiel oratoron kaj organizanton, trovos en la libro la eĥojn de lia elokventa parolmaniero kaj entuziasmigaj argumentoj. Koncizaj informoj en la piednotoj lokigas tempe kaj cirkonstance ĉiun unuopan paroladon aŭ prelegon, kaj utile gvidas la leganton." G. G. en "L'Esperanto"

"La vortoj, la stilo kaj ne malpli la enhavo, la temoj estas kiel suko por la plantoj, kiel mielo por la abeloj, por tiuj, kiuj ŝatas okupi sin pri aferoj iomete ekster la tagtaga vivo." E. H. en "Dana Esperanto-Bulteno"

" ... la leganto trovas inspiron kaj pruvon, ke Esperanto estas mirinda komunikilo de la plej profundaj pensoj kaj la plej noblaj aspiroj kiujn homoj povas koncepti." H. W. Holmes en "The British Esperantist"

"Prof. Ivo Lapenna kuntenas kaj reprezentas per sia unika oratora arto, kiu fontas el forta individuo, brilan lingvokapablon, ekzaktecon kaj profundan scion, pariĝintan kun rapida psikologia kapto de la argumentaj rimedoj."

El recenzo en "Norda Prismo"

"Tiun ĉi libron ni devas tre forte rekomendi ... La paroladoj estas modelo de stilo kaj de lingvo. Ĝi atestas pri tre granda oratora talento; ... Preskaŭ ĉiuj partoj, senescepte, meritus lokon en antologio de retoriko."

Drs. F. Roose en "Sonorilo"

"Ĉi tiu libro ne estas nur elmontro de brila serio da paroladoj, kiuj meritas la presitan formon, sed ... ankaŭ kvazaŭ vivanta skizo pri la evoluo kaj historio de la moderna Esperanto-Movado." JHR. en "Norvega Esperantisto"

"La lingvaĵo estas perfekte klarkomprenebla, facilflua kaj ĉiel imitinda. Konsekvenca uzado de ata-ita meritas admiran studon (ekz. sur p. 12)."

El recenzo en "The Australian Esperantist"

"Kio distingas tiel senkonkurence la retorikon de Profesoro Lapenna? Kio estas ĝia esenco? Unuavice tio, ke li ne parolas nur por paroli, sed por ion diri, por komuniki al la aŭskultantoj ion komunikindan ... La forto de Lapenna kuŝas ĝuste en tio, ke liaj paroladoj ne estas sterilaj, sed fekundaj: fekundaj je konstatoj, informoj, argumentoj, kontraŭargumentoj, konkludoj kaj direktivoj. Tiajn paroladojn oni ne povas forgesi ... La dua granda avantaĝo de Lapenna estas lia stilo: klara, konciza, simpla, kaj tamen eleganta ... Kaj trie: la paroladoj de Lapenna estas aktualaj, realismaj, sobraj ... Tiel mi klarigas la retorikajn sukcesojn de Profesoro Lapenna, la nerezisteblan allogecon de lia libro."

Inĝ. M. Mamuĵiĉ en "La Suda Stelo"